

- 1947/49 (1980) Esperanto

BULGARA

1-1980

ESPERANTISTO



organo de bulgara esperantista asocio





Ekde la aŭtuno de 1979 en Burgas funkcias elementa kurso por civilianoj — 27, prersonoj — kun gvidanto Elena Stojkova.

En la kurso oni organizis vesperon de amika kunesto, celebroy de naskiĝtagoj, renkontigon kun gekursanoj el u. Jambol ktp. Ĉio ĉi grave helpis, por ke neniu forlasu la kurson. La ener-
gia juna gvidantino Stojkova, ĵus diplomita en la Interna-
ciaj Kursoj en Burgas, faris specialan metodikan lecionon,



La nova esperantista "geedza" paro Barbara Gondek (Pollando) kaj Ilija Ivanov (u. Loveĉ, Bulgario) metas florojn antaŭ la monumenton de Todor Kirkov.

KARAJ LEGANTOJ.

Dum la nova 1980 jaro la redakcio de „Bul-
gara Esperantisto“ vidas sian plej gravan taskon
en la plua plibeligo de la enhavo, la arta kaj
teknika aranĝo de la revuo. Tial ni atendas
viajn proponojn, konsilojn kaj aktivan kunla-
boron.

Al ĉiuj, kiuj ĝis nun kunlaboris per artikoloj,
rakontoj, versajoj, skizoj, eseoj, korespondadoj,
fotoj ktp. la redakcio sincere dankas, havante la
la esperon, ke ili ankoraŭ dum la nova jaro daŭ-
rigos sian valoran kunlaboradon. Anticipe ni
dankas ankoraŭ tiujn, kiuj estonte kontribuos por
la plibonigo kaj variigo de nia revuo — unu el
la plej malnovaj E-eldonadoj en la mondo.

Al ĉiuj kunlaborantoj kaj legantoj ni direktas
sinceran gratulon: FELICAN NOVJARON! Ĝi
estu paca kaj fruktoporta, kaj vi — sanaj, feli-
ĉaj kaj ĉiam fidele batalantaj por novaj sukce-
soj de nia kara lingvo Esperanto, por novaj ven-
koj de la internacia amikeco, por triumfo de la
paco en la tuta mondo!

ENHAVO

* * * Antaŭstarantaj taskoj	1
Prof. d-ro Humphrey Tonkin. Novjara me aĝo . . .	1
* * * Nikola Aleksiev honorita per medalo „Julius Fuĉik“	2
Ĝejms Oldriĝ. Finigu la ludo je milito!	2
Protestaj telegramoj	3
Belka Beleva. Societo, veterano	4
Dimitro Dobrev. „Esperanto — lingvo de la mondo“	6
Rajna Kasabova. Cvjatko Todorov bone pre- zentiĝis	6
* * * 75-jarojn E-societo en Pleven	6
* * * Pluraj E-kursoj	6
Ĥristo Rastev. E-kursoj en Pavel-Banja . . .	6
Alis Konstantinova. Esperanta ekspozicio . .	6
Rosinka Vasileva. Celebro de Ĉorju Panĉev	7
Ĉonju Panĉev. Kun amo kaj sindono al Espe- ranto	7
Rajna Konstantinova. La entuziasmo	8
Simeon M. Simeonov. Testamento al la juna esperantisto	8
Ilija Ivanov. Valora interŝanĝo de sperto . . .	9
Mariana Elenova. La studentoj-esperantistoj festas	10
* * * La dua junulara E-klubo (en Krasnojarsk)	10
Fani Mihajlova. Antikva kaj eterne juna . .	11
Nano Kjuĉukov. 60-jariĝo de Cvetan Spasov .	12
Canko Murgin. Gazeto „La Mondlingvisto“ . .	13
Rudolf Eichler. Germanaj kontraŭfaŝistoj pri Georgi Dimitrov	14
Prof. Vasil Ĉoĉov. Internacia seminario „Soci- politikaj aspektoj de la E-movado“	15
* * * Pripaca ekspozicio en Samarkando . .	16
* * * Veselin Damjanov en Italio	16
Johanes Palu. Esperanto-instruado en Sovetio .	16
Dimitro Denĉev. Sincera kontakto kun la pub- liko (pri la Infana E-Teatro)	III
* * * Deziras korespondi	III
* * * Tra la gazetaro	IV

Sur la kovrilpaĝo:

En la vintra pureco de monto Vitoŝa

Redakta komitato:

Kunĉo VĀLEV (ĉefredaktoro), Vasil BOROVIANSKI,
Evgeni GEORGIEV, Dimitro DENĈEV, Dimitro
HAĜIEV, Krĉstju KARUCIN, Haim LEVI (viceĉef-
redaktoro), Flori NIĜOLOV.

Administranto: Metodi Garev

Korektis: M. Elenova, K. Vasileva

Sofio, p. k. 66

Tel. 31-00-29



ANTAŬSTARANTAJ TASKOJ

Kiel veraj patriotoj de sia lando, la bulgaraj esperantistoj ankaŭ dum la nova jaro aktive plenumos siajn taskojn en fabrikoj, kooperativoj kaj oficejoj ŝultro ĉe ŝultro kun siaj kolegoj — por realigo de la jarplano de nia lando por 1980.

En la tuta mondo la popoloj indigne protestas kontraŭ la instalado de novkvalitaj amasmortigiloj en Okcidenta Eŭropo. Kiel konsekvencaj internaciistoj kaj pacbatalantoj ni aliĝas al tiu mondskala kontraŭstaro al la monstraj planoj de NATO, kiuj celas subfosi la ekvilibron en Eŭropo kaj neniigi la vivon sur nia malnova kontinento — lulilo de la homa civilizo. Kune kun ĉiuj sinceraj pacamikoj ni deklaras: senprokrasta intertrakto inter Oriento kaj Okcidento, for la militplanojn de la imperiistoj!

En tia atmosfero ni devas zorgi pri modela organiza laboro dum nia jubilea jaro, kiam okazos la 40a jubilea kongreso de BEA. Ĝia sidejo estos la antikva kaj ĉiam reuniganta urbo Plovdiv, kie en la fino de la pasinta jarcento oni komencis propagandi Esperanton.

Kiel jam anoncote, honore al la kongreso estas deklarita konkurado pri varbado de novaj abonantoj al „Bulgara Esperantisto“, „Paco“ kaj „Scienca Mondo“. Ni esperas, ke multaj

lokaj societoj distingiĝos en tiu direkto.

La kongreskomitato konstatis en sia lasta kunsido, ke la aliĝado al la kongreso ne staras en la tagordo de ĉiuj distriktaĵaj estraroj kaj societoj. Oni devastuj aktivigi en tiu rilato.

Dum januaro kaj februaro okazos la jarkunvenoj de la lokaj societoj, kiam la estraroj raportos pri sia agado kaj starigos novajn taskojn por estonta agado. Dum marto kaj aprilo sekvas la distriktaĵaj konferencoj kaj elekto de novaj estraroj. Ni esperas, ke oni prilaksos objekte la ĝisnunan agadon kaj elektos aktivajn estraranojn.

Ankaŭ la sekcioj devas sin prepari por la kongreso. Kiel kutime, tie la sekciestraroj raportos pri la farita laboro kaj oni elektos novajn gvidorganojn. Iuj el la sekcioj, ekz. junulara, instruista, MEM, k.a. laboris sukcese depost la kongreso en Ruse kaj do povos prepari interesajn raportojn.

La 40a jubilea kongreso koincidas kun la 1300-jara datreveno de la fondiĝo de la bulgara ŝtato kaj 110 jaroj de la naskiĝo de V. I. Lenin. Tio instigu nin al pli amasa partopreno en la kongreso.

Ĉiuj ni analizu nian ĝisnunan laboron, lernu el la propraj eraroj kaj faru ankoraŭ unu paŝon antaŭen por la ĉiujfanka firmigo de nia asocio.

NOVJARA MESAĜO DE LA PREZIDANTO DE UEA

En la jardeko, kiu nun malfermiĝas antaŭ ni, la internacia lingvo Esperanto fariĝos centjara. Tra la jaroj depost 1887 la lingvo alportis ĝojon kaj feliĉon al milionoj da homoj. Ĝi malfermis la horizontojn al simplaj civitanoj, ĝi dissemis sentojn de internaciismo kaj komprenemo en mondo malpaca, ĝi kreis kulturajn pontojn inter la nacioj kaj ebligis praktikan komunikadon inter la homoj en spirito de egaleco.

Ĝia influo etendiĝis preter la uzantojn mem. Scioj, akiritaj per E-o, penetris en la sociojn, kaj la principoj de esperantismo efikis ankaŭ ĉe tiuj, kiuj ne konas la lingvon mem. Kvankam la rivalco inter la grandaj naciaj lingvoj ankoraŭ regas en multaj internaciaj rilatoj, E-o abunde montris, ke ĝi kapablas plene ludi la rolon de efika in-

ternacia lingva komunikilo.

Restas tamen la demando, ĉu tiu lingvo, plene elprovita, fariĝos akceptita de la grandaj internaciaj organizaĵoj, la diverslandaj edukaj sistemoj kaj la ĉiam kreskanta nombro de homoj, kiuj partoprenas la internacian komunikadon. Restas la demando, ĉu oni utiligos ĝin kiel lingvon de la nova komunika teknologio. Aŭ ĉu oni preferas solvi la internacian lingvan problemon per diskriminaciaj solvoj, favorante certajn naciojn kaj lingvojn kaj malfavorante aliajn.

La respondo al tiu demando restas parte en la fluo de la historio; sed parte ĝi restas en la manoj de la parolantoj de E-o. La mondo ne venos al E-o kvazaŭ nature. Se tiel estus, ĝi venus al paco kvazaŭ nature, ĝi venus al malmaltraktado kvazaŭ nature kaj estingus homan

Letero el Londono

FINIĜU LA LUDO JE MILITO!

En la 50-aj jaroj, en la periodo de „malvarma milito“, mi veturis el Moskvo al Londono por soveta aviadilo, kiu devis surteriĝi en Bruselo. Kiam la aviadilo enflugis la aerspacon de FRG kaj Belgio, du usonaj ĉaseroj traflugis antaŭ ĝi verŝajne ekzercante pafadon kontraŭ aercon. Ili ludis danĝeran ludon. Por ili tio estis simpla trejnad, sed se estus okazinta akcidento, ili trovus sendube „pacan“ klarigon.

La ludo je milito estas ĉiam integra ero de milit-preparo. Por ke oni povu bone realigi la militludon, oni devas esti preta gvidi sian politikon al la rando de militeksplodo. Nome kun celo al tio ĉi Usono alvokas la okcidentajn ŝtatojn akcepti sur sian teritorion 572 novajn raketojn Simile al la usonaj ĉasaviadiloj, „pripafantaj“ la aviadilon de la soveta aerkompanio „Aeroflot“, oni destinas tiujn ĉi nukleajn raketojn por militludi kaj teni nin „je rando de katastrofo“.

Vere komenciĝis tre komplika kaj danĝera ludo por konvinki la eŭropajn NATO-landojn konsenti pri lokigo de la novaj usonaj raketoj.

Intertempe la Nederlanda Laborista Partio kontraŭstaris tiun ĉi planon kaj postulis de la registaro ekiri la vojon de intertraktoj, sed ne la vojon de minacoj. En ĉiuj laboristaj kaj socialdemokratiaj partioj en Okcidenta Eŭropo ekzistas forta opozicio kontraŭ la dislokigo de novaj raketoj, kaj ĉiu enketo pri la publika opinio montras ĝeneralan subtenon al la ideo pri interparoloj kaj ne por minaco per pligrandigo de la raketa armeo.

Jen kial, skribis ĵurnalo „Observer“ (Observanto), la soveta decido pri retiro de soveta tankoj kaj armetrupoj el GDR starigis NATO-n en malfacilan situacion. La soveta iniciato konfuzis la burĝan gazetaron. La parolado de Leonid Breĵnev en Berlino elvokis grandegan reĉon. Vere oni devas konstati, ke preskaŭ ĉe ĉiuj okcidentaj politikaj komentistoj la soveta proponoj provokis amason da demandoj. Tamen ĉiu serioza komentisto samtempe deklaras, ke oni devas atente trakti la proponojn kaj ne ignori ilin. Ili ĉiuj kalkulis la korelativon inter la armeoj en Eŭropo, inter Oriento kaj Okcidento. Sed ili preterlasas kalkuli la situacion en la cetera parto de la mondo. Ekzemple la usonanoj posedas ĉirkaŭ 2500 militbazojn en pli ol 30 fremdaj landoj. Ili disponas armeon kaj minimume 12000 nukleajn militbazojn en pli ol 30 aliaj landoj. Samtempe Sovetunio havas ĉe ne unu nuklean eksplodigilon en eksterlando kaj nuntempe ĝi komencis retiri 20 000 militistojn.

Leonid Breĵnev diris: „Ni ne strebas al milita supereco... Nia strategia doktrino havas kategorie defendan karakteron.“

Tamen en Okcidento ni aŭdas senĉese militavokojn. Ni havas ĝeneralajn kaj elstarajn politikistojn, kiuj senkaŝe minacas Sovetunion. Sed la prudentaj kaj maltrankviligitaj homoj en Okcidento pensas alie.

Responde al la soveta iniciato, en Britio evoluas nova kampanjo por subteno de la movado por milita malstreĉiĝo. Grupo da elstaraj sociantoj — inter ili estas lorde Brokveĵ, lorde Noel Bejker, la episkopo de Birminghamo kaj Orienta Londono, sinjorino Gudrit Hart — eksministro de la laboro, Riĉard Bodi — parlamentano, konservativa partiano, kaj ankaŭ Trever Filips — prezidanto de Nacia Studenta Unio, subskribis deklaron, kiu alvokas ĉiujn landojn-membrojn de UN elabori proponon pri reduktado de la armilaro.

GEJMS OLDRIĜ, angla verkisto

kruelecon kaj homan mizeron kvazaŭ nature. Male, ĝi venos al E-o, ĉar la parolantoj de tiu lingvo konscie, harmonie kaj sagace laboras por tiu celo, forigante la sencion kaj farante el skeptikuloj konvinkitojn. Oni ofte aŭdas, ke ekzistas antaŭjuĝoj kontraŭ E-o, sed vere la ĉefa malhelpo estas sencio kaj prudentaj duboj, forigeblaj per pravaj argumentoj.

Cu, do, la jardeko de la 1980-aj jaroj estos la jardeko de E-o, la jardeko, en kiu oni fine konsciigos pri la maljusteco kaj la nenecesaj kostoj de la nuna internacia lingva reĝimo? Lingvoj ne kreskas kiel arbaraj fungoj: ili bezonas jardekojn, ĉe centojn da jaroj, por maturiĝi. La Internacia Lingvo jam kreskis kaj maturiĝis: ĝi staras nun preta por tiuj, kiuj pretas utiligi ĝin.

En decembro 1979 kompletigas 25 jaroj da rekono de E-o flanke de UNESKO: la fama rezolucio subtena al E-o estis akceptita de la Ĝenerala Konferenco en 1954. Tiu datreveno koincidas kun nova erao en la rilatoj kun UNESKO kaj UN, inaŭgurita de la vizito de la Ĝenerala Direktoro de UNESKO al nia kongreso en 1977 kaj nun de la malfermigo en Novjorko de nova oficejo de UEA, kies specifa celo estas fortigi la rilatojn kun UN. En la jaro nun finiĝanta la sekretario de EKOSOK vizitis nian kongreson, kaj UEA estis elektita al gvida rolo en la konsanta komitato de neregistaraj organizaĵoj ĉe UNESKO.

UEA mem estas pli forta, pli harmonia kaj pli stabila finance kaj morale ol ĝi eble iam ajn estis. Niaj membroj estas lojalaj kaj sindonaj. Kaj novaj moviĝoj de intereso pri E-o animas kontinentojn, antaŭe apenaŭ tusitajn de la Internacia Lingvo.

Staras preta la lingvo. Malfermiĝas al ni iom post iom la internacia organizaĵo, la publika opinio. Pretas nia Asocio. Je tiu ĉi favora epoko, je la sojlo de nova jardeko, ni redediĉu nin al laboro por la Internacia Lingvo per novaj fortoj. La jaro 1980, kaj la tuta jardeko, kiun ĝi inaŭguras, alportu pli pacan, justan kaj harmonian mondon, kie la spirito de egaleco kaj kompreniĝo animas ankaŭ la lingvan kampon per la Internacia Lingvo E-o.

Prof. d-ro HUMPHREY TONKIN,

NIKOLA ALEKSIEV HONORITA PER MEDALO «JULIUS FUČIK»

La prezidio de la Internacia Asocio de Ĵurnalistoj honoris tri elstarajn bulgarajn ĵurnalistojn per la medalo „Julius Fučik“ — Stojne Krástev, Nikola Aleksiev kaj Renata Natan. La medalo estas donita pro grandaj meritoj en la disvolvigo de la progresema ĵurnalistiko en Bulgario kaj pro valora kontribuo al la firmigo de la internacia ĵurnalistika solidareco.

Ni gratulas nian elstaran E-aganton N. Aleksiev, kiu fariĝis portanto de tiu altranga distingo, ligita kun la nomo de Julius Fučik — eminenta proleta ĵurnalist, sindona antifaŝisto kaj batalanto por paco!

„NE“ AL LA VETARMADO!

Al la Ĝenerala Sekretario de UN,
Novjorko

Atestimata s-ro Kurt Valdhajm,

La kunveno de sofiuj e-istoj, okazinta la 19-an de decembro 1979, akre protestas kontraŭ la decido de la agresema bloko NATO instali en kelkaj okcidenteŭropaj landoj ĉirkaŭ 600 novajn strategiajn atomarmilojn direktitajn al Sovetunio kaj la ceteraj landoj de la Varsovia Pakto.

NATO faris tion kontraŭ la volo de la eŭropaj kaj aliaj popoloj, kontraŭ la vasta publika opinio, kiu insistas, ke NATO akceptu sen politikaj antaŭkondiĉoj la proponon de la Soveta Registaro pri malgrandigo de la ekzistantaj raketarmiloj en Okcidenta Eŭropo, apartenantaj al NATO kaj Sovetunio.

Ni, la sofiuj e-istoj, aliĝas al la protestoj de la monda publika opinio kontraŭ la ege danĝeraj planoj de NATO, pli speciale de Usono, FRG kaj Britio, ĉar tiuj planoj minacas la homaron per nova monda milito. La konstanta vetkurado en la armado kreas premisojn por neniigo de la kulturo kaj la civilizo, parto de kiu estas ankaŭ la movado por internacia lingvo Esperanto.

La batalo por serenigo de la internaciaj rilatoj daŭros decidi! Ni batalos por fiaskigi la monstrajn militplanojn de NATO!

Por paco en la tuta mondo! Por malmarmado! Por mondo sen armiloj, por mondo sen militoj!

*Por la kunvenintoj:
PREZIDANTINO BELKABELEVA*

La e-istoj de u. Plovdiv kaj de la distrikta E-organizaĵo de Plovdiv renkontis kun granda maltrankvilo la decidon de NATO pri dislokigo de novaj nukleaj armiloj kun strategia destino sur teritorioj de FRG, Italio kaj aliaj okcidenteŭropaj landoj.

Ni estas certaj, ke ĉiuj honestaj homoj en Eŭropo kaj en la tuta mondo sentas la saman maltrankviligon, ĉar tia paŝo minacas la pacon sur la tero kaj la sekurecon de la tuta homaro. Ni, la e-istoj, kies ĉefa celo estas la komprenigo inter la popoloj kaj la paco sur la tero, esprimas nian profundan indignon pro tiu paŝo de la nigraj militarismaj fortoj de la inperiismo frunte kun Usono.

For la manojn disde la sorto de la homaro! Vivu la serenigo en la internacia vivo, brilu ĉiam pura kaj paca ĉielo super la tero, floru ĝojo en ĉies koro!

DISTRIKTA ESTRARO DE BEA — PLOVDIV

Novjara donaco por okcidenteŭropanoj
(El «Time», USA)

Ni, la partoprenantoj en solena vespero en u. Drjanovo, organizita de la Komunuma Komitato de Pacdefendo, la Komunuma Konsilantaro de Virinoj kaj E-Societo „Ivan Vladkov“ dediĉe al la Internacia Jaro de la Infano kaj la 120a datreveno de la naskiĝo de d-ro L. L. Zamenhof — la kreinto de E-o kaj arda batalanto por paco kaj interpopola amikeco, esprimas akran proteston kontraŭ la decido de NATO pri dislokigo de raketoj kun nuklea

eksplozigo en la landoj de Okcidenta Eŭropo.

Ni indignas, ke responde al la pacaj proponoj de Sovetunio pri malmultigo de la armiloj en Eŭropo NATO iras al nova militprovoko. Ni insistas, ke NATO nuligu sian decidon! Ni volas, ke la infanoj de la mondo vivu en paco kaj amikeco!

„Ne“ al la vetarmado! Vivu la paco!

*Por la kunvenintoj:
LA PREZIDANTO DE LA E-SOCIETO GENO MANEV*



90 jaroj ekde la fondiĝo
de la Sofia Urba E-Societo

SOCIETO-VETERANO

IMPONA CELEBRO

En oktobro 1979 la sofiaj e-istoj solene celebris rimarkindan datrevenon — la 90an naskiĝtagon de la Sofia E-Societo — la unua en Bulgario kaj kvara en la mondo (post Nurnbergo, Moskvo kaj Odeso). La celebrazo okazis en la Klubo de la Kulturagantoj.

La prezidanto de BEA k-do Hristo Gorov tralegis la ukazon de la Stata Soveto pri honorigo de la Sofia Urba E-Societo, kiu post la Dua Mondmilito havas la nomon de la granda verkisto, humanisto kaj arda amiko de E-o Maksim Gorkij. La honorigo estas per la plej alta kulturordeno en Bulgario — „Kiril kaj Metodi“ — I grado.

Raporton pri la vivo kaj popolutila agado de la Sofia E-Societo „Maksim Gorkij“ faris ĝia prezidantino la artistino Belka Beleva.

Al la societo jubileulo estis direktitaj multaj salutoj de E-organizaĵoj. Aparte ĝoja estis la salutparolado de doc. Boris Stefanov — prezidanto de la Leningrada E-Klubo.

En la riĉa belarta programo partoprenis per recitaĵoj la artistoj-esperantistoj Belka Beleva, Anani Anev, Mihail Cobanov, Mišo Zdravev, per kantoj la artistoj esperantistoj Maria Angelova, Karamfilka Adamova, Veselin Damjanov, Prodan Prodanov, Dimitro Denčev kaj la Sofia Esperantista Floro.

„Esperanto estas internacia lingvo. Ĝi vivas, perfektigis kaj, mi ripetas, ĝi venkos ĉiujn malamikojn. Tio estas la plej granda kultura venko kaj, krome, tute sensanga.“

La artefarita lingvo, kiu evoluas tre rapide, estas tute natura fenomeno, ĉar ĝi respondas al la bezonoj de la nuntempaj homoj trovi, krei por ĉiuj kompreneblan lingvon.“


Kiam nia patrono Maksim Gorkij eldiras la suprajn pensojn pri la internacia lingvo E-o, en Sofio la urba E-societo jam havas sian biografion. Ĝi estas societo-veterano en la historio de la monda E-movado: nur unu jaron post la fondiĝo de la unua E-societo en Nurnbergo kaj kelkmonate post la fondiĝo de la societoj en Moskvo kaj Odeso la unua bulgara e-isto Miloslav Bogdanov (1868—1914) fondas en Sofio E-klubon. Ĝi havis la nomon Esperantista Klubo de Sofio, sed varbis membrojn el la tuta lando, do fakte ĝi estis centro de la ĵus naskiĝinta E-movado.

En decembro Bogdanov komencis eldoni ankaŭ presorganon „Mondlingvisto“ — la dua en la mondo post „La Esperantisto“ redaktata de Zamenhof mem kaj eldonata en Nurnbergo ekde la somero de 1889.

Arda adepto de E-o en tiu tempo fariĝis ankaŭ Nikola Kovačev (1867—1924). Bogdanov kaj Kovačev disvolvas viglan ĵurnalistan agadon. Ili interesiĝas pri la stato de la popolo, pri sociaj problemoj, membras en la progresema Radikala, poste en la Respublikana Partioj. Kun la entuziasmo de nia juna intelektularo el tiu epoko Bogdanov kaj Kovačev komencas disvastigi E-on kaj la ideojn de la E-movado. Kiel unua prezidanto de la Sofia E-klubo Bogdanov disvolvas viglan E-propagandon pere de la gazetaro, organizas kaj gvidas E-kurson, aranĝas kartotekon de la membroj de la klubo, kies nombro rapide kreskas. Li estis en korespondanta ligo kun d-ro Zamenhof. En la fino de 1889 la E-klubo en Sofio havas jam 112 membrojn.

Sed en 1895 j. Bogdanov forveturas al eksterlando por daŭrigi sian studadon en jura fakultato, kaj Kovačev iras labori en la provinco. La vivo de la E-klubo en Sofio estingiĝas. Sed aliloke ĝi daŭre pulsas. En artikolo de N. Kovačev en E-revuo „Rondiranto“ (1904 j.) oni legas: „Mi ofte renkontiĝis kun Todor Peev kaj ĉe ni naskiĝis la ideo fondi E-klubon en la ĉefurbo, similan al la kluboj en eksterlando. Sparante nek tempon, nek trankvilon Todor Peev aligis al la listo de la iniciatintoj kaj post multaj kunsidoj estis fondita la ĉefurba E-klubo „Aŭroro“ en decembro 1902. Ĝia prezidanto estiĝis Todor Peev, poste honora prezidanto de la sama klubo, kiu funkcias ankaŭ nun.“

Todor Peev, naskita en Etropole, estas elstara aganto de la bulgara naciliberiga movado, amiko kaj kunbatalanto de Vasil Levski, aktiva kleriganto kaj pedagogo. Sub lia gvido E-societo „Aŭroro“ komencis viglan agadon. Komence de 1903 ĝi organizas sian unuan kurson kun ĉ. 40 personoj. Neniu defalas — male, la nombro kreskas. Estis organizita ankaŭ granda publika kunveno, en kiu Hr. Popov faras prelegon pri E-o. La prelego estis multoblita kaj dissendita al ĉiuj membroj kune kun la statuto de la societo. Ĝi bone helpis la Movadon en la tuta lando. Fine d. 1903 j. Peev eksigas por doni vojon al junaj homoj. La jara kunveno proklamas lin honora prezidantoj.



La prezidanto de BEA Hr. Gorov pendigas la ordenon sur la verdan flagon.

Lige kun tio li turnigas al la junularo per la vortoj: „Mi pensas, ke mi faris tion, kio estas necesa." La fajrero ekbrulis, kaj vi, la junaj, transformu ĝin en flamon."

Inter la iniciatintoj pri fondo de E-societo estis Georgi Atanasov, pianisto, Georgi Zografski kaj la reveninta en Sofion ĵurnalisto N. Kovačev. Elstaraj agantoj de la scienco, arto kaj literaturo aliĝis al la societo.

La E-klubo „Aŭro" fariĝis organizanto de la bulgaraj e-istoj. Kune kun la E-klubo de Plovdiv „Stelo" la 1-an de decembro 1903 en Sofio fondiĝis Bulgara Societo por Propagando de E-o. Ĝia presorgano fariĝis gazeto „Rondiranto".

Tiutempe en Sofio formiĝis literatura rondo, plejparte de studentoj, kiu komencis eldoni litografie gazeton „Unua Paŝo". En ĝia redakcio grupiĝis Simeon Petkov, Ĥristo Rjaĥovski, Georgi Nikolovka.

En 1906 j. en Sofio estis kunvokita E-kongreso, kiu prenis decidon eldoni dumonatan gazeton „Bulgara Esperantisto". De ĝi aperis tamen nur tri numeroj.

En 1907 j. en Veliko Tŕrnovo estis fondita landa organizado — Bulgara E-Ligo, kio donis fortan puŝon al la tutlanda E-movado.

En 1908 j. kara gasto de la sofiaj e-istoj estis la konata rusa e-isto Nikolaj Pavloviĉ Evstifeev, membro de la Akademio de E-o. En la salono de „Slavjanska Beseda" okazis granda publika kunveno, en kiu Evstifeev parolis je temo: „E-o sur la Balkana Duoninsulo kaj la slava ideo". Efiko granda! Tuj estis organizitaj kelkaj E-kursoj.

Puŝon al la Movado donis ankaŭ la E-kongreso en Ruse en 1909 kaj la gastado de bulgaraj e-istoj en Bukureŝto. En Sofio estis fondita studenta E-grupo kun sekretario Atanas D. Atanasov — elstara aganto de la bulgara E-movado. Dum la sekvaj jaroj en la E-kursoj lernis la lingvon la estontaj verkistoj Nikolaj Rajnov, Georgi Rajčev, Ĉudomir, Emanuil Popdimirov ka. Fortan puŝon antaŭen donis la elstara profesoro de literaturo en la Sofia Universitato Ivan Siŝmanov, kiu, laŭ invito de la Studenta E-grupo, faris en januaro 1912 grandan prelegon je temo „Ĉu estas ebla kaj necesa internacia helplingvo". Lia pozitiva rilato al E-o kiel solvo de la problemoj forte influis la mensojn. Tiu fama parolado aperis poste en aparta broŝuro kaj fariĝis baza propagandilo de la bulgaraj e-istoj, ankaŭ nun uzata. Post la Unia Mondmilito la profesoro mem kaj lia edzino Lidija Siŝmanova ellernis la lingvon kaj ili fariĝis membroj de la E-societo.

Tuj post la malfavora periodo de la militoj (1912—1918), en 1919 en Sofio okazis kongreso de la bulgaraj e-istoj, komencis aperi oficiala organo de la organizado — gazeto „Bulgara Esperantisto", aperanta ĝis nun. En 1921 la Ministerio de Popola Klerigo enkondukis, laŭ propono de ĈK de la organizado, fakultativan instruadon de E-o en la realaj gimnazioj — impona venko, por kiu plej grandan meriton havas la sofiaj e-istoj. Bedaŭrinde tio ne daŭris longe: la faŝista diktaturo, kiu komenciĝis post 1923 j., rilatis malfavore al E-o kaj en 1924 forigis la E-instruadon.

En la aŭtuno de 1923 la sofiaj e-istoj organizis propagandan verdan semajnon. Ili malfarmis ĝin per granda publika kunveno, en kiu denove parolis prof. d-ro Ivan Siŝmanov, jam e-isto. En novembro la sekvajn jaron (1924) denove estis organizita simila semajno. En la unua publika kunveno parolis prof. d-ro Josif Fadenheht, en la ferma — la fama bulgara literaturo prof. d-ro Mihail Arnaudov.

Plej elstaraj agantoj de la E-movado kaj membroj de la Sofia E-Societo dum la postmilita periodo estis Georgi Aktargiev, Atanas D. Atanasov, Petro Jordanov, Simeon Petkov, Stefan Minkov, Panajot Kolvev ka.

La sofiaj e-istoj marksistoj, membrante en la komuna E-societo, fondis en 1921 ankaŭ apartan grupon sub la nomo „Balkana Libera Stelo". Ĝiaj plej fervoraj reprezentantoj estis Panajot Kolvev, Stefan Nenkov (blinda), Angel Nikolov, Meleŝko



Doc. B. Stefanov el Leningrado enmanigas gratuladreson al Belka Beleva.

Siŝkov ka. La grupo publikigis propagandan broŝuron de P. Kolev „La laborista klaso kaj la internacia lingvo". Post la frakaso de la Septembra Ribelo (1923) la grupo ĉesigis sian oficialan ekzistadon. Post kvin jaroj tamen, kune kun la vigligo de la kontraŭfaŝismaj fortoj en la lando, la laboristaj e-istoj komencis organizi apartajn laboristajn E-societojn. Ekde 1929 en Sofio oni komencis eldoni gazeton „Balkana Laboristo", kiu aperis tri jarojn sub la redakto de Nikola Aleksiev, Atanas Lakov ka. En 1930 estis fondita Laborista E-Asocio (LEA), kies organo ekde la sekvaj jaroj fariĝis la bulgaringva ilustrita dusemajna ĵurnalo „Mejdunaroden Ezik" (Internacia Lingvo), iom poste ŝanĝita en „Mejdunaroden Rabselkor" (Internacia Laborista-Kampanara Korrespondanto). Tiu lasta kun granda sukceso aperadis ĝis la somero de 1934, kiam la nova monarkofaŝista potenco malpermesis ĝin. Plej elstaraj agantoj de LEA en Sofio estis N. Aleksiev, Asen Grigorov, Atanas Lakov, Ivan Keremidčiev, Nikola Sopov, Simeon Petrov, Angel Petkov, Trajana Petkova.

En 1935 j. per sumo, testamentita de la fervora sofia e-ino Smaragda Nafarova, kasitino de la E-societo, oni aĉetis propran E-domon en la centro de la ĉefurbo. La progresemaj e-istoj aktive laboris, uzante diversajn formojn — ekskursojn, belartajn programojn, E-paĝojn en la ĵurnaloj „Zarja" kaj „Kambana" ktp.

En la periodo 1941—42 pri E-o oni ektimas paroli. BEA estas malfondita de la faŝista ŝtato, „Bulgara Esperantisto" — ĉesigita. Multaj e-istoj estas en malliberejoj kaj koncentrejoj. Ĉ. 150 fidelaj popoloj gefiloj pereas en la kontraŭfaŝisma batalo. Inter ili ankaŭ la elstaraj sofiaj e-istoj Nikola Sopov, Nikola Botuŝev, Penka Miĥajlova, Stanju Vasilevka.

La e-istoj entuziasme renkontis la liberon je la 9-a de septembro 1944. Eklaboris vigne nia E-societo, kiu ricevis la nomon de la granda aniko de E-o „Maksim Gorkij". Nun ĝi estas unu el la plej grandaj E-societoj en la tuta mondo, kies membraro superas 500 homojn. Ĝi disvolvas riĉan, plensangan agadon por disvastigo de E-o, por klerigo kaj edukado de siaj membroj en spirito de internacia amikeco kaj paco.

B. Beleva

Internacia Asocio „Monda Turismo“ * Distrikta Estraro de BEA — Pazarjik * E-Societo „Stoju Kalpazanov“ — Velingrad

Partoprenu en la tradiciaj internaciaj E-aranĝoj:

II-a INTERNACIA ESPERANTISTA TURISTA RENKONTIĜO 15—25 de majo 1980.

V-a INTERNACIA ESPERANTISTA SEMINARIO-FERIO 18—30 de septembro 1980.

Venu por ĝui neforgeseblan internacian esperantistan etoson! Vin certe ravos la pitoreska Rodopo-montaro, la sanefiko de la freŝa pinaero, la kuracaj varmaj mineralakvoj en banejoj kaj plaĝo, la brilanta suda suno kaj la konata bulgara gastamo!

Limdato por aliĝo: 15 de aprilo kaj la de aŭgusto.

Por detalaj informoj turnu vin al adreso: Bulgario, 4600 Velingrad, PK 7, la Esperanto-societo.

„ESPERANTO — LINGVO DE LA MONDO“

jubilea eldonaĵo

La celebrego de duonjarcenta agado de organizaĵo estas evento kun granda signifo. Tia estas ankaŭ la celebrego de la 50-jara jubileo de E-societo „Paco“ en urbo Bjala, urbo-muzeo de la bulgara-soveta amikeco, fama ankaŭ pro sia unika ponto super rivero Jantra, konstruita de la talenta filo de la bulgara popolo Koliŭ Fiĉeto.

En tiu urbo en la aŭtuno de 1929 j., do antaŭ 50 jaroj, en kondiĉoj tre pezaj por kultura laboro, entuziasmaj idealistoj kaj humanistoj kiel Sava Altimirski kaj Simeon Baltaĝiev — instruisto kaj lernanto — fondis E-societon „Paco“, unu el la plej aktivaj en nia lando. „Paco“ fariĝis vera kultura fajrujo kaj eduka faktoro. Ĝia agado neniam fermiĝis en limigitaj societaj kadroj, ĝi agis sur vasta kultura fronto paralele kun ĉiuj ceteraj organizoj, edukante la homojn en spirito de internacia amikeco, paco kaj humanismo. Ĝi kreis ankaŭ riĉajn rilatojn kun demokratiaj pacamaj homoj el multaj landoj de la mondo.

Lige kun la 50-jara jubileo de E-societo „Paco“ en Bjala aperis eldonaĵo sub la redakto de S. Baltaĝiev kaj Ivan Severnjaŝki kun varia kaj interesa enhavo. Havante antaŭvide la limigitajn eldoneblecojn en tiu malgranda urbo, la apero de la menciita libro estas vere laŭdinda faro. La leganto povas konatiĝi kun la riĉa agado de E-societo „Paco“, kun la vivo kaj agado de ĝiaj fondintoj S. Altimirski kaj S. Baltaĝiev, kun la vivo kaj agado de d-ro Zamenhof ka. Estas presita ankaŭ bela versaĵo de Ivan Kolarov pri Esperanto.

Ni sincere bondeziras pliajn sukcesojn al E-societo „Paco“ kaj ĝiaj fondintoj!

Dimitro Dobrev

CVJATKO TODOROV BONE PREZENTIĜIS

En Sumen komence de novembro 1979 la regiona stacio de la komunikoj kaj la filatelista societo „Madara Cevalrajdanto“ organizis duan regionan filatelan ekspozicion.

Partoprenis ĝin per siaj diverstemaj kolektoj 15 ŝumenaj filatelitoj kaj po unu el la ĝemelaj urboj Herson (USSR) kaj Magdeburg (GDR).

Inter la ekspoziciitaj kolektoj aparte grandan intereson vekis la kolekto de la multjara e-isto Cvjatko Todorov, prezidanto de DE de BEA en Sumen, je temo „Mondfamaj e-istoj kaj amikoj de la Internacia Lingvo“. Ĝi meritplene estis premiita per honora diplomo kaj k-do Todorov — per filatelaj materialoj.

Rajna Kasabova

75 JAROJN E-SOCIETO EN PLEVEN

La 15an kaj 16an de decembro 1979 jaro la societo „Eterna Amikeco“ en Plevnen festis sian 75-an datrevenon. Geesperantistoj el tuta lando renkontiĝis en tiu heroo urbo por festi kune kun la jubileuloj.

La 15an posttagmeze okazis solena kunveno, kiu finiĝis per arta programo.

Vespere je la 19.30 ĝis 23a horo en restoracio „Ros-tov na Don“ la partoprenantoj vespermanĝis, dancis, havis la okazon aŭdi salutvortojn, poemojn, kantojn ktp.

Dum la sekvanta tago ni havis la plezuron trarigardi faman kaj interesan lokon — la unikan „Panoramon“. Ĝi prezentas emociajn momentojn el la Rusa-Turka Liberiga Milito dum 1877—1878 jaroj. Neblas resti apatia, rigardante la bildojn, simile al vivaj.

Ni ekveturis al niaj urboj kontentaj de ĉio vidita kaj aŭskultita.

PLURAJ E-KURSOJ

En Plevnen ekde la aŭtuno de 1979 funkcias jenaj E-kursoj por komencantoj:

1. civitana — gvidanto Emilija Kanjovska;
2. civitana — gvidanto Margarita Geneva;
3. 2 kursoj por lernantoj — gvidanto Vālka Dobreva;
4. por lernantoj en la mezlernejo de nutra industrio — gvidanto Margarita Papuĝieva;
5. por lernantoj en mezlernejo de aŭtotransporto — gvidanto Marija Konstantinova;
6. por lernantoj ĉe legejo „Liljana Bårdarova“ — gvidanto Margarita Geneva;
7. por laboristoj en uzino „Mizija“ — gvidanto Vālka Dobreva.

Funkcias ankoraŭ:

8. civitana kurso de II grado — gvidanto Stefka Cenkova;
9. por lernantoj — II grado — en mezlernejo de aŭtotransporto — gvidanto Marija Konstantinova.
10. civitana — III grado — gvidanto Zdravko Velikov.

E-KURSO EN PAVEL-BANJA

En la perlo de Roza Valo kaj famekonata banloko Pavel-Banja en novembro 1979 ekfunkciis E-kurso, kiun partoprenas 16 personoj, precipe junuloj. La kurso estis organizita per la helpo de la loka popola legejo kaj Komsomolo. Ĉiuj kursanoj abonis „BE“-on, kelkaj — „Paco“-n. „BE“-on abonis ankaŭ la legejo kaj la biblioteko de kelkaj entreprenoj. Do entute en nia malgranda urbo en 1980 estos ricevataj ĉ. 30 E-periodaĵoj.

La komencantoj kaj la malnovaj e-istoj serĉas korespondantojn el la tuta mondo. Skribu al adreso: Bulgario, 6155 Pavel-Banja, Esperanto-societo „Supreniro“.

Hristo Rastev

ESPERANTA EKSPOZICIO

Ekspozicion sub titolo „Esperanto — lingvo de paco kaj amikeco inter la popoloj“ aranĝis E-societo „Trifon Hristovski“ en u. Pomorie lige kun la nova lernejo. Sur 35 tabuloj en la urba ekspoziciejo estis eksponitaj E-libroj, periodaĵoj, korespondadoj kaj aliaj objektoj, ricevataj el la tuta mondo. Tio estis elokventa pruvo pri la vastaj internaciaj ligoj de la societanoj.

La ekspozicio vekis grandan intereson. Venadis vizitantoj dise kaj grupe, aparte impresita estis la lernantaro. Al la deĵorantoj estis direktitaj multaj demandoj kaj petoj. La loka ĵurnalo „Partizanski Zavet“ skribis pri la evento. Rezulto — du kursoj por lernantoj kaj por plenaĝuloj.

Alis Konstantinova



En Jambol oni solene celebris nian E-veteranon Conju Pančev lige kun lia 80-jarigo kaj 50 jaroj da E-agado.

La celebrazo komenciĝis per riĉa belarta programo, en kiu oni recitis E-poezian kaj aŭtoroj legis siajn verkojn dediĉe al la jubileo, al E-o, al la paco kaj internacia amikeco.

Raporton pri la vivo kaj E-agado de Conju Pančev faris Dimitro Hristov, vicprezidanto de la Distrikta-Urba Estraro de BEA. Kortuŝajn rememorojn el la riĉa vivo de la jubileo rakontis ankaŭ d-ro Anastas Salambaŝev.

En la nomo de la Klubo de Veteranoj-Turistoj salutis lin L. Brănekov kaj I. Târpanov. En la nomo de CE de BEA la brusto de k-do Pančev estis ornamita per ora insigno. La kasisto de DUE de BEA Mihail Jordanov enmanigis al li donacon.

La feliĉa jubileo dankis al ĉiuj kaj faris valoran donacon al la urba E-societo „M. Gorkij“ — multajn librojn por la E-biblioteko.

Rosinka Vasileva

KUN AMO KAJ SINDONO AL ESPERANTO

En la aŭtuno de 1925 en u. Jambol mi komencis lerni E-on kun granda entuziasmo.

Mi lernis nokte en mia domo, ĉar tage mi laboris. Kartonetoj kun vortoj — sur unu flanko en E-o, sur la alia — en bulgara lingvo grave helpis min. En ĉiu libera momento mi elpoŝigis la kartonetojn, lernis vortojn. Tion mi faris marŝante sur la stratoj, atendante mian vicon en magedzeno, la komencigon de filmo ktp. Ĝis la printempo la tuta lernolibro estis finita.

Post tio mi ripetis la tutan lernolibron kaj mi jam sentis min preta por internacia korespondado. Mi sendis mian adreson al la redakcio de revuo „Esperantisto“ en Genevo. Ne pasis multe da tempo kaj mi ricevis la unuan E-an leteron el Pollando. Kompreneble, mia ĝojo estis grandega! Post tio mi komencis ricevi leterojn el diversaj landoj, sed plej multe al mi platis la leteroj de unu pola instruisto, ĉar ŝi skribis interese kaj elokvente. Ŝi eĉ laŭdis min, ke mi kapablas skribi kun facileco. Kompreneble, tio kuragiĝis min. Generale la korespondado multe helpis al mi en la lernado de la lingvo. Kaj miaj amikoj e-istoj multe surpriziĝis, kiam mi komencis paroli kun ili en E-o.

Venis la tago, kiam mi vizitis la unuan E-konferencon en aprilo 1926 en Plovdiv. Tie mi konatiĝis kun multaj e-istoj el tiu urbo — Srebropetrov, Ivan Sivarov k. a., ankaŭ el aliaj urboj. Mi estis feliĉa povante uzi la lingvon praktike. La e-istoj el Asenovgrad invitis la grupon de Jambol viziti ilin. David Sasonov, Djulgerov k. a. al mi estis konataj, ĉar mi korespondis kun ili longan tempon. La tagoj en Plovdiv kaj Asenovgrad estis vere feliĉaj.

Mia entuziasmo duobliĝis, kiam mi povis viziti la unuan por mi kongreson de la bulgaraj e-istoj en Varno (1926). Tie mi aŭskultis belan paroladon en E-o, konatiĝis kun elstaraj e-istoj kiel Georgi Dolapčiev, Ivan Iliev, la Sukero, T. Lakova k. a.

Reveninte en Jambol mi komencis labori por E-o ankoraŭ pli fervore, el tuta koro. Nia E-Societo „Maksim Gorkij“ posedis malgrandan klubojon, sed malgraŭ tio ni disvolvis bonan agadon. Formiĝis mo-

dela miksitaj floro, gvidata de Boris Ibrišimov. Mi ankaŭ partoprenis la floron. Ni organizis amuzvesperon kun varia programo en popola legejo „Săglasie“ (Konkordo). Post tio ni luis pli grandan ejon por la klubo, en kiu ni organizis ekspozicion kun bonega propaganda sukceso.

Ĉar nia kursgvidanto translokiĝis en Plovdiv, mi komencis gvidi la kurson por komencantoj. Ni invitis gastojn el Sliven kaj ankaŭ vizitis Sliven. Same ni renkontiĝis kun e-istoj el aliaj urboj. Cio helpis min plue perfektigi en E-o. Ne pasis multa tempo, kaj oni elektis min prezidanto de la E-societo. Tia mi estis reelektata ĝis 1933 j. Tiam en Jambol venis arkitekto Aleksandro Kurtev — bona kaj sperta e-isto, kaj ni elektis lin prezidanto. Mi fariĝis sekretario. Dum la sekvaĵaj jaroj mi vizitis E-kongresojn en Ruse, Târnovo, St. Zagora, Sofio, Burgas, Smoljan k. a. Poste mi vizitis la Universalajn Kongresojn de E-o en Varsovio, Budapeŝto, Sofio.

Al mia adreso el Sofio venis sendaĵoj de revuo „Internacia Rabsekor“, kaj mi volonte disvastigis ĝin inter gelnernantoj, laboristoj k. a., kiuj atendis ĝin senpacience.

Kiam en Germanio prenis la regpotencon Hitler, du germanaj junaj e-istoj, forlasinte sian patrolandon, venis en Jambol. Ili gastis tutan monaton en mia domo. Mi donis al ili vestojn kaj poste tra Svilengrad helpis ilin forveturi al Turkio.

Dum la Dua Mondmilito la E-agado estis en stagno, sed post la liberigo je la 9. IX. 1944 nia agado aktivigis. Mi denove estis elektita prezidanto. En 1947 prezidanto elektigis Aleksandro Blagoev, kaj mi — estraro. En 1949 en Jambol okazis nacia E-kongreso, por kiu ni multe laboris. Dum la sekva periodo mi estis du jarojn prezidanto kaj poste ĝis 1974 mi regule plenumis la taskojn de kasisto. Bedaŭrinde, pro la progresinta aĝo mi ne plu kapablis esti estraro kaj cedis lokon al junaj homoj.

Modeste mi laboris por E-to dum mia tuta vivo, sed obstine, kun amo kaj sindono, kaj mi kredas, ke mi faris utilan kontribuon al la nobla batalo por amikeco, komprenigo kaj paco inter homoj kaj popoloj en la mondo.

LA ENTUZIASMO



La Sofia E-Societo „Maksim Gorkij“ organizis solenan celebren de sia veterano Simeon Simeonov, E-poeto, okaze de lia 80-jariĝo.

Prelegon pri la literatura verkaro de Simeonov faris Ljubomir Miĥajlov. La publiko eksciis, ke nia veterano naskiĝis en 1899 en la urbeto Lukovit, kie li antaŭ 60 jaroj komencis lerni E-on aŭtodidakte kaj tuj ekverkis en la nova lingvo. La poezia verkaro de la jubileulo — originala kaj tradukita — ampleksas pli ol 400 verkojn! Li eldonis E-krestomation, tradukis memstare aŭ kun kolektivo multajn prozajn verkojn (inter ili ankaŭ „Sub la jugo“ de Vazov), kontribuis dum pli ol duonjarcento al la E-revuoj „Bulgara Esperantisto“, „Internacia Kulturo“, „Nuntempa Bulgario“, redaktis la E-revuon „Ripozoj“, la periodaĵon „Bulgarino“, la organon de IPTEA „Interligilo“ (ĉar laŭ profesio li estis radio-telegrafisto) k. a. Longega estas la listo de la bulgaraj poetoj, kies verkojn Si-

meonov tradukis en E-on: Ljuben Karavelov, Hristo Botev, Petko kaj Penĉo Slavejkov, Stojan Miĥajloski, Peju Javorov, Dimĉo Debeljanov, Stamen Panĉev, Hristo Smirnenki, Emanuil Popdimitrov, Dora Gabe, Hristo Jasenov, Elisaveta Bagrjana, Nikolaj Lieliev, Nikola Vapcarov, Nikolaj Zidarov, Ivan Burin, Valeri Petrov, Blaga Dimitrova, Kiril Hristov, Nikolaj Rakitin, Mladen Isaev, Leda Mileva, Asen Bosev k. m. a.

L. Miĥajlov tre sukcese faris paralelon inter la bulgaraj originaloj kaj ties tradukoj, faritaj de Simeonov. Li emfazis, ke tradukado estas pli malfacila ol verkado, eĉ kiam oni tradukas en la gepatran lingvon.

Inspiron por la ege ampleksa verkaro de la jubileulo donis al li lia sindediĉo kaj amo al E-o, lia granda homa koro, resonanta al ĉiuj sentoj.

Sekvis multege da salutoj — en la nomo de diversaj E-organizaĵoj kaj personoj. Ankaŭ mi salutis la jubileulon uzante interalie la vortojn de Zamenhof: „Konservu plenege, amiko plej kara, vignecon kaj sanon ĝis festo centjara!“ Mi rakontis ankaŭ pri la bonega akcepto de la tradukoj de S. M. Simeonov, kiun ili trovis en Anglujo, kie mi ilin uzis kiel ilustraĵojn al mia prelego pri Ivan Vazov.

La artisto Mišo Zdravev kortuŝe recitis la poemon „Najado“ de Kiril Hristov, traduktitan de Simeonov.

La jubileulo, profunde emociita, dankis al la organizantoj, gratulintoj kaj al la tuta E-publiko pro la celebrazo. Interalie li deklaris, ke la faktoroj, al kiuj li ŝuldas sian okdekjaran vivon, en bona fizika kaj psika stato estas: biologia heredeco, modereco, vigla intelekta laboro, animtrankvilo kaj bonhumoro, homamo kaj... Esperanto.

R. Konstantinova

SIMEON M. SIMEONOV

TESTAMENTO AL LA JUNA ESPERANTISTO

Mi turnas min al vi, samideano,
mi, esperantisto-veterano,
kaj volas doni mi al vi konsilon:
se vi deziras havi plenuilon
de nia kara lingvo Esperanto
kaj esti ties bona posedanto,
vi nepre devas havi ambicion
akiri pri la lingvo bonan scion.
Por porti digne ĝian verdan flagon,
vi devas verve studi ĉiun tagon.
Neniam restu en izoliteco —
ĝi estas malamiko de l'perfekteco,
sed trovu homon spertan en parolo,
samideanon bonan, kun helpvolo —
pov vi necesa estas ja amiko

por perfekteco kaj parolpraktiko:
Esperantisto estu vi fervora!
Kuragon havu en temp' malfavora!
Por perfektigi vin en Esperanto,
vi devas ankaŭ esti ja leganto
de Esperanta artiliteraturo,
por propra plialtigo de l'kulturo. . .
Regule la kunvenojn vi vizitu
kaj bonajn parolantojn nur imitu!
Daŭrigante tiel diligente,
vi lernos Esperanton fundamente.
Do estu vi esperantist' sincera
kaj paca batalant' — kontribuanto
por homfeliĉo kaj por vivo vera,
por nia kara lingvo Esperanto!



LANDA REVUO DE LA ESPERANTO-PAROLO KAJ KANTO

1—3 de aprilo 1980, Loveĉ

Dediĉita al la 1300-jariĝo de la Bulgara Ŝtato

Partoprenantoj: de 7 ĝis 35 jaraĝo.

Daŭro de apartaj programoj: Kolektivaj — ĝis 15 minutoj, individuaj — ĝis 6 minutoj.

Klasado kaj premiado: kolektivaj kaj individuaj aparte.

Kotizo: 8 levoj (por manĝado kaj noktado de la 1 de aprilo vespere ĝis la 3 de aprilo tagmeze).

Sumojn sendu ĝis la 10a de marto al adreso: 1303 Sofio, bul. Hr. Botev 97, Bulgarski esperantisки съюз (за Мариана Еленова).

Preparu vin por la nobla konkurado!
Partoprenu amase la revuon — festo kaj manifestacio de la bulgara esperantista junularo!

VALORA INTERŜANĜO DE SPERTO

Du aŭtunaj tagoj en la pitoreska urbo Loveĉ lasis agrablajn rememorojn al pli ol cent junaj e-istoj. Tio estis la 17a kaj 18a de novembro, kiam en la urbo de la unua bulgara kosmonaŭto okazis renkontiĝo de la E-junularo el nordokcidenta Bulgario. Partoprenis ĝin reprezentatoj de la sekcioj de BEJ el Trojan, Vidin, Gabrovo, Sevlievo, Ruse, ankaŭ el Sofia, Plovdiv, Gălăbovo.

La unuan tagon, sabate, en restoracio „Strates“, kiu troviĝas en freŝaera verda parko apud la urbo, la gastamaj dommastroj aranĝis riĉenhavan amuzvesperon. Abunda vespermanĝo kaj bona orkestro grave kontribuis por kreigo de agrabla etoso. Estis tombolo, kantoj, spritaĵoj. La internacia esperantista geedza paro Barbara Gondek kaj Ilija Ivanov (vd. la foton sur paĝo 2 de la kovrilo) gvidis kvizon (viktoringon) kun premioj. La ĉefredaktoro de „Bulgara Esperantisto“ Kunĉo Vălev parolis pri la aŭtoro de la Internacia Lingvo kaj lia senmorta verko. Kun majstreco li recitis la Zamenhofan poemon „La vojo“.

La sekvan tagon, dimanĉe, en la Domo de Politika Klerigo okazis konferenco, kies ĉefa temo estis interŝanĝo de sperto pri disvastigo kaj disflorigo de la E-movado inter la junularo. La konferencon gvidis la estraranino de BEJ Mariana Elenova. Post salutparolo de la prezidanto de DE de BEA en Loveĉ Asen Matev sekvis raporto de Petja Karaivanova — sekretariino de la junulara sekcio de E-societo „Kolombo de la Paco“ en urbo Gălăbovo. Si rakontis pri la abunda kaj multflanka por- kaj priesperanta agado de la junaj e-istoj en Gălăbovo. Nur kvin jaroj pasis ekde la fondiĝo de tiu E-societo, kaj nun ĝiaj aranĝoj kaj aktivecoj dominas en la junulara vivo de la tuta urbo. Kursoj de E-o, abiturientaj kaj printempaj baloj, amuzvesperoj, celebro de jubileoj kaj naskiĝ-

tagoj, partopreno en la ĝenerala socipolitika vivo de la urbo, ekskursoj, partopreno en landaj kaj internaciaj laborbrigadoj kaj E-aranĝoj ktp. — jen aktivecoj, kiuj allogas la E-junularon kaj ligas ĝin firme al la E-societo.

Sekvis interesa diskuto. La prezidanto de la Klubo de E-istoj ĉe la Sindikata Kulturdomo en Loveĉ Coĉo Kolarov konigis al la ĉeestantoj la novan organizan agadformon, kiu sukcese kontribuas por disvastigo de nia lingvo inter neesperantistoj. Pri la fruktdona laboro de la esperantistaro en la najbara urbo Trojan informis Laljo Lalev. Pri sia utila agado parolis reprezentantoj el Ruse, Vidin, Gabrovo. La prezidanto de BEJ Dimitro Papazov rekomendis utiligon de la jam elprovitaj formoj de organiza laboro kaj serĉon de novaj, pli efikaj formoj.

Generaligan resumon faris la sekretario de BEA Kunĉo Vălev. Li emfazis kelkajn gravajn momentojn en la laboro de la juna esperantistaro:

— pli intima ligo inter la diversaj generacioj de e-istoj;

— pli granda fido al la junaj movadanoj kaj samtempe estimo al la malnovaj e-istoj, utiligo de ties riĉa sperto, aŭtoritato kaj ligoj;

— planado de la E-agado, sistema kontrolo de la donitaj taskoj;

— kunlaboro kun ĉiuj socipolitikaj organizaĵoj, aparte kun Patrolanda Fronto kaj la Popolaj Leĝejoj;

— variigo de la laborformoj, plena utiligo de la sperto de la „kolomboj de la paco“ el Gălăbovo.

Fine la gastoj vizitis la domon de la unua bulgara kosmonaŭto Georgi Ivanov kaj la monumenton de la Apostolo de Libereco Vasil Levski.

Ilija Ivanov

La 1-2 de decembro en la pitoreska ripozloko Paniŝte, en la ŝinoj de Rila-montaro proksime al u. Stanke Dimitrov, okazis la tradicia nacia studenta E-renkontiĝo. La gaja kaj agrabla etoso estis kreita de niaj gastamaj dommastroj, kiuj certigis al la partoprenantoj perfektajn kondiĉojn por amuziĝi, danci, kanti. Sabate vespere estis arangita diskoteko, kaj la sekvan tagon la studentoj aŭdis prelegon de Kalinka Vasileva je temo „E-o kaj scienco“ kaj belan entuziasman paroladon de k-do K. Vălev pri E-o, pridiskutis interesajn demandojn el sia E-vivo, ri-

cevis informojn pri antaŭstarantaj naciaj kaj internaciaj arangoj. Fine la partoprenantojn salutis per kelkaj E-kantoj la grupoj de Sofio kaj Velingrad. Sepdek kvin gejunuloj el Sofio, Plevno, Velingrad, Blagoevgrad, St. Dimitrov, kunigitaj de la ideoj pri paco kaj internacia amikeco, pasigis du gajajn kaj tre agrablajn tagojn en la bela Rila-montaro. Ili disigis kun plialtigita volo labori obstine por la disvastigo de E-o kaj kun la forta deziro en plej proksima tempo renkontiĝi denove.

Mariana Elenova

Intersangu sperton kun sovetaĵ kamaradoj!

LA DUA JUNULARA E-KLUBO

Versajne en Sovetunio ne troviĝis E-klubo, kiu progresis tiom rapide, kiel la Krasnojarska Esperantista Junulara Klubo (KEJK). En 1974 jaro ĉe la klubo de internacia amikeco en la Krasnojarska Universitato ekfunkciis malgranda E-kurso kiel sekcio de la klubo. La kursanoj ne estis e-istoj, sed ili tre deziris esti internaciistoj. Pro tio ili ekstudis E-on. Je la fino de majo 1975 en la kurso restis ne pli ol 15 personoj. La grupo tamen faris grandan laboron: la membroj prelegis abunde, partoprenis vesperojn de internacia amikeco per siaj programoj, publikigis artikolojn en la loka gazeto, organizis ekspoziciojn ktp. Al la Junulara Tendaro de Sovetaĵ E-istoj (SEJT-17 apud u. Ustj-Kamenogorsk) veturis delegacio el 13 e-istoj de Krasnojarsk.

Post tiu ĉi tendaro la krasnojarskanoj „kuragiĝis“: ili decidis fondi apartan, urban E-klubon. Dank' al subteno de la universitata komsomola organizaĵo kaj de la Urba Komitato de VLKSM estis ricevita klubo ĉe la juskonstruita urba Palaco de Kulturo. Jen estas la vojo de la krasnojarska E-klubo dum tri jaroj de ekzisto:

1975 j.: 22a loko en la socialisma konkurado de SEJM, 1976 j. — 6a loko, 1977 j. — 3a loko, 1978 j. — la dua loko!

Kial tiom sukcesis la juna E-klubo?

Versajne pro tio, ke la krasnojarskaj e-istoj agas ne nur por E-o, sed pli kaj pli per E-o. Pro tio, ke la klubo havas klaran pozicion: ĝi estas klubo de internacia amikeco surbaze de E-o kaj okupiĝas per E-o por (kaj pri) internaciisma edukado, pabatalo kaj interpopola amikeco. Tiu ĉi pozicio estas sociutila, socibezona.

La urbaj E-kursoj allogas ĉiujare amason da dezirantoj. Dum tri jaroj finis la kursojn pli ol 100 homoj, el kiuj ĉ. 60 aktivis en la klubo. Vasta gazeta propagando ankaŭ influas al la socia opinio en krasnojarska regiono: dum la pasinta periodo oni publikigis pli ol 80 E-materialojn en diversaj informiloj de la regiono (en pli ol 15). Jam okazis 5 elsendoj pri E-o kaj pri la E-klubo per la televido de Krasnojarsk.

Interne la klubo estas organizita sufiĉe vikle. Laŭ ĝia statuto ĉiun laboron gvidas laŭplane klubula estraro. Ĝin eniras prezidanto, sekretario, kasisto kaj la estroj de fakoj propagando, korespondado, kultur-amasa laboro, instruado. Ekster la estraro restas ankoraŭ kelkaj ĉefrespondecoj (kun konstantaj komisioj): bibliotekisto, estro de fotolaboratorio, peranto de E-literaturo, mastro de la klubbejo, gvidanto de vokalinstrumenta muzikensemblo.

Ekde la unuaj paŝoj la membroj de KEJK strebis al plivastigo de la eksterlanda korespondado. Dum certa periodo (1976 j.) la kvanto de individuaj kaj

kollektivaj ligoj atingis 200 el pli ol 20 landoj.

Versajne plej fruktodona laŭ sia sociutileco kaj laŭ graveco por la klubo estis 1978a agadaro. Ĝi enhavis eventojn kaj arangojn, kiuj estigis „turno-punkto“ por la klubo.

En decembro 1977 laŭ iniciato de KEJK estis organizita konsilio de la urbaj kluboj de internacia amikeco. Ĝin eniris la interkluboj de la institutoj pedagogia, medicina, teknologia, instituto de kolormetado kaj mem KEJK. En marto 1978 pli ol 70 membroj de la kluboj partoprenis dimanĉlaboron, kaj la ricevita sumo estis donita por la XIa Tutmonda Festivalo de Junularo kaj Studentoj. Okazis ankaŭ tri politikaj vesperoj de internacia amikeco. Membro de KEJK partoprenis Semajnon de Internacia Amikeco, organizitan en la akademio urbeto de u. Novosibirsk. Unufoje en la historio de Krasnojarsk du delegitoj de la urba E-klubo (I. Danilin kaj Irina Stepanova) partoprenis la 63an UK de E-o en Varno (Bulgario).

Okaze de la alproksimiĝanta 60-jara jubileo de VLKSM la krasnojarskaj e-istoj disvolvis vastan kampanjon. Ili organizis internacian ekspozicion de infandeseĝaĵoj el 5 landoj: Svislando, Hungario, GDR, Francio, Japanio. Ankaŭ dank' al korespondaj geamikoj el eksterlando sukcesis la dua ekspozicio — „Eksterlandaj e-istoj al Lenina Komsomolo“. Al la adreso de la Urba Komitato de VLKSM venis leteroj el Hungario, GDR, Ĉeĥoslovakio ka., kies aŭtoroj varme gratulis la gelaborantojn de la Komitato okaze de la jubileo. Dum vespero de la interkluboj en la granda halo de la Palaco de Kulturo, kiun okazigis krasnojarskaj e-istoj dediĉe al la 60-jariĝo de VLKSM, Tamara Iljkeviĉ, unu el la gvidantoj de la Komitato, kun granda miro kaj plezuro konstatis tiun ĉi fakton: firmaj ligoj de KEJK kun eksterlandaj geamikoj. Tiu ĉi vespero kolektis pli ol 300 junajn partoprenantojn el 6 urbaj institutoj kaj universitato. T. Iljkeviĉ emnagis honorajn foliojn de la Urba Komitato al kvin aktivuloj de la internaciisma movado, inter kiuj estis tri e-istoj. Tre grava: la ĉeestintoj, laŭ propono de KEJK, akceptis „Alvokon al la krasnojarska junularo“. Ĝi alvokas al disvastigo de la internaciisma movado, al plua kunordigo en la agado de la interkluboj.

Per tiu ĉi kampanjo fakte komenciĝis la nova 1978/79-a agadaro de la Krasnojarska E-Klubo. La junaj e-istoj de Krasnojarsk diras: „Ni volas uzi E-on por utilo de nia socialisma socio!“ Evidente estas, ke ili tion parolas ne vane. Ĉar paco, amikeco, interkompreniĝo ĉiam estas necesaj kaj utilaj por la soveta popolo, por la soveta ŝtato. Tiel postulas ankaŭ la koroj de la junaj e-istoj de Krasnojarsk.

ANTIKA KAJ ETERNE JUNA

Plovdiv estas unu el la plej belaj kaj plej malnovaj urboj sur la Balkana Duoninsulo. Ĝi situas en la koro de Trakio, meze de fruktodona kamparo. En ĉiu periodo de sia multjarcenta ekzistado ĝi estis grava loĝloko sur la ĉefa vojo, liganta du kontinentojn — Azion kaj Eŭropon. Fondita sur tiu ĉi krucvojo, Plovdiv estis alloga loĝloko de diversaj triboj kaj popoloj de sudo kaj nordo, de oriento kaj okcidento. Al tio kontribuis ankaŭ la proksimeco de la granda rivero Hebros (Marica) kaj la nature forkitikigitaj montetoj. Sur ĝia teritorio kuŝas restaĵoj de grandaj antikvaj kulturoj: traca, malnovgreka, romia, bizanca, malnovslava k.a.

Jam en la novŝtona epoko (antaŭ ĉ. 6000 jaroj) tie ekloĝis homoj. La arkeologiaj trovitaĵoj, kiuj ofte kuŝas 7 metrojn sub la nivelo de la nuntempa urbo, montras, ke ĝiaj unuaj loĝantoj estis la tracoj, kiuj nomis ĝin Evmolpia.

En la jaro 342 a. n. e. Filipo II la Macedona konkeris Trakion. Li pligrandigis kaj fortikigis la loĝlokon sur la Trimonto, kiu estigis „polis“ (urbo) kaj ricevis la nomon de sia konkerinto — Filipopolis (urbo de Filipo). La urbo kreskis kaj estigis grava centro de la vasta macedona provinco Trakio. De tiu tempo estas trovitaj malmultaj arkeologiaj monumentoj en la limoj de la urbo.

Post la disfalo de la Macedona Stato la traca loĝantaro de Filipopolis rapide liberigis. La urbo ricevis la nomon Pulpudeva. De tiu traca nomo, modifita de la slavoj kiel Páldin, devenas la nuna — Plovdiv.

En la I jc. de n. e. post longa rezisto la urbo estis konkerita de la romianoj kaj komenciĝis la t. n. romia epoko (I—IV jc.), kiu lasis plej profundajn spurojn en la historia kaj kultura evoluo de antikva Plovdiv. La urbo, nomita Trimonium (Trimonto), prosperis. La kvarjarcenta disflorigo tamen estis ĉesigita de la gotoj, kiuj ruinigis la urbon.

Post la degenero de la Romia Imperio la urbon ekregis Bizanco. Altrangaj familioj gvidis ĝian sorton ĝis la alveno de la slavoj kaj la fondiĝo de la Unua Bulgara Stato, kies parto ĝi estigis je la komenco de la 9 jc.

En la arto, florinta en tiu ĉi urbo, oni renkontas neimageblan kunligon de senbrida pagana fantazio kaj kristana humileco.

Bulgario estis sur la sojlo de la Renesanco, kiam komenciĝis la otomana invado. La hordoj de Lala-Sahin konkeris Plovdiv en 1364 j. La pliparto de la bulgara loĝantaro estis mortigita kaj la multjarcenta urbo cingrita. Sed la bulgara spirito konservigis en la fabele belaj domoj kun pordegoj, ornamitaj per forĝitaj feraĵoj kaj kun buntaj plafonoj — elstaraj monumentoj de originala kulturo.

Dum la Renesanco Plovdiv estis unu el la plej gravaj centroj de la batalo por popola klerigo kaj kulturo, por eklezia kaj nacia sendependeco. Tie loĝis kaj verkis vico da renesancoj — Zahari Zograf, Stanislav Dospevski, Hristo Danov, Najden Grov, Ivan Vazov, Konstantin Velickov.

La 16an de januaro 1878 j. la urbo renkontis la kavalierianojn de la brava kapitano Burago kaj la rusajn soldatojn, kiuj liberigis Bulgaron el la kvinjarcenta otomana juko.

Plovdiv estis en la unuaj vicoj de la batalo kontraŭ la faŝismo kaj kapitalismo. Blagoev kaj V. Kolarov gvidis la plovdivan partian organizaĵon dum la jaroj de ĝia fondiĝo kaj fortikiĝo. En la jaroj de plej streĉa batalo la posteuloj de Blagoev kaj Kolarov organizis la loĝantaron por amasa armita batalo kontraŭ la faŝismo. En ĝi pereis multaj bravaj popoloj riloj, inter kiuj ankaŭ esperantistoj: Stojan Mihaj-



La Monumento de la Soveta Soldato («Aljoŝa») sur la Monteto de la Liberigintoj en Plovdiv.

lov, Rajčo Kirkov, Todor Sofroniev, Mitko Fanteto, Menaĥem Menaĥemov k.a.

Venis la Naŭa de Septembro 1944 — la unua tago de la nova historio de nia Patrio. Nun sur la supro de la Monteto de Liberigintoj staras la monumento de soveta soldato karese nomata „Aljoŝa“, simbola figuro de la sovetaĵ fratoj-liberigintoj.

Post la venko de la socialisma revolucio Plovdiv rapide evoluis. Ĝi estas la dua laŭ grandeco kaj industria produktado urbo en Bulgario.

Plovdiv nun havas 300 240 loĝantojn. Ĝi situas sur ambaŭ bordoj de rivero Marica kaj sur ses pitoreskaj montetoj.

Plovdiv estas grava industria centro. En ĝi estas multaj maŝinkonstruaj entreprenoj, la granda teksa kombinato „Marica“, kombinato por koloraj metaloj „D. Blagoev“ k.a.

Ciujare en Plovdiv estas organizata Internacia Foiro — renkontiĝo de komercaj reprezentantoj el kvin kontinentoj. Samtempe la foiro brile reprezentas la ĉiufankan progreson de socialisma Bulgario.

Multaj plodivanaj loĝas en belaj logkompleksoj: Kamenica, „Gagarin“, „Hristo Smirnenki“, „Izgrej“ k.a. Nun estas konstruata nova komplekso „Trakija“, en kiu loĝos pli ol 80 000 homoj.

Plovdiv estas centro de riĉa kultura vivo. Tie estas fondita la unua en nia lando profesia teatro, kies tradiciojn nun sekvas la plovdiva dramateatro. Suprenira estas la krea vojo de la Popola Opero kaj de la Pupteatro. La Simfonia Orkestro estas rekonita ne nur en nia lando, sed ankaŭ en eksterlando. Gloron de la socialisma arto portas ankaŭ la folkloro ensemblo „Trakija“ kaj la ĵazgrupo „Blankaj, verdaj, ruĝaj“. La societo de la plovdivaj verkistoj estas unu el la plej elstaraj eksterĉefurbaj literaturaj grupoj. La proprakaraktera, pitoreska atmosfero de Plovdiv altiris kaj inspiras multajn talentajn majstrojn de la peniko. Ĉi-jare la urba biblioteko „Ivan Vazov“ festis sian 100-jaran jubileon.

Plovdiv estas universitata urbo. En ĝi laboras kelkaj superaj institutoj. Ĝi estas ankaŭ sidejo de multaj sciencespioraj institutoj.

Vizitindaj estas la muzeoj de Plovdiv: etnografia, arkeologia, naturscienca, muzeo de la Renesanco kaj Naciliberigaj Bataloj, Muzeo de la Revoluciaj Bataloj, Muzeo de la Libroeldonado. La Belarta Galerio posedas riĉan kolekton de pentraĵoj de elstaraj bulgaraj majstroj.

Plovdiv posedas ion de la ĉarmo de la eternaj urboj. Ĝiaj stratoj kaj placoj rememorigas la romantikan bulgaran Renescon. Sur la antikvaj restaĵoj de la urbo nun estas konstruata la hela komunisma estanteco de la miljara kaj eterne juna Plovdiv.

Fani Mihajlova

kunveno lige kun lia 60-jariĝo, kvazaŭ tuta revoluciema Bulgario ĉeestis kaj spirdetene aŭskultis la vervan kaj sinceran paroladon de lia kunbatalanto — la poeto kaj partizano Veselin Andreev.

Profunde kortuŝan impreson faris la

60-JARIĜO DE CVETAN SPASOV

Pri Cvetan Spasov oni ne povas rakonti facile, ĉar estas multflanka lia agado kiel poeto kaj publicisto, kiel funkciulo de RMS*, kiel profesia revoluciulo.

Kvankam lia vivo daŭris nur kvaron-jarcenton, lia nomo kaj agoj restis, por ke oni sekvu lian ekzemplon. Li vivis kaj verkis inspirita de la granda Botev kaj pereis simile al Botev antaŭ la triumfo de nia granda idealo. Laŭ sia heroaĵo kaj agado lia figuro transiras la limojn de Xla partizana zono, kie li laboris kiel gvidanto de RMS kaj kiel politika komisaro de partizana taĉmento. Se oni konatiĝus kun la publikaĵoj de Cvetan Spasov, oni nepre eksentus la antaŭrevolucian atmosferon de la epoko, en kiu li vivis kaj laboris. Lia nomo brilas inter la stelfiguroj de la poetoj-partizanoj Hristo Kârpačev, Vasil Vodeničarski, Atanas Mančev, Ivan Nivjanin.

Guste pro tio en la salono de teatro „G. Kirkov“ en lia naskiĝurbo Pleven, dum la solena

letero de kamarado Todor Jivkov, per kiu li esprimis sian estimon kaj senton de respekto al lia karmemora nomo kiel heroo kaj revolucia poeto-komunisto. „Simile al la famaj bulgaraj poetoj Botev, Smirneski, Geo Milev kaj Vapcarov, — substrekiĝis k-do Jivkov, — Cvetan Spasov pereis en sia floranta juneco. Lia literatura heredaĵo estas negranda, sed kun forta kaj daŭra efiko.“

Juna kaj multpromesa poeto kaj publicisto, Cvetan Spasov estis adepto de nia homama E-movado. Tio evidentiĝis dum la XXVI kongreso de Bulgara Esperantista Asocio, okazinta en urbo Pleven en 1939 j., kies kunsidojn li partoprenis kun vigla intereso. Dum tiu tempo ja tio estis devo de ĉiu aktiva anti-faŝisto, membro de la partio aŭ de RMS. Spasov estis samtempe funkciulo de RMS kaj de Esperanto. Li dediĉis al la kongresanoj specialan versaĵon „Vizitu Pleven“.

... Foliumu vi la historion
kaj tralegu pri sankta batal',
pri heroo mort' kaj incendio,
gloraj agoj, malhonora fal'...
La muzeojn vi vizitu nepre
kaj relikvojn tie vidos vi,
ja vi scias, ke tra urbo Pleven
venis la liber' de Bulgari'.

En letero al sia amiko Cvetan Spasov skribis: „La kongreson vizitis multaj esperantistoj. La etoso de la kongreso estis belega. En la statuto de BEA oni faris malgrandajn ŝanĝojn. Detale mi informos vin, kiam ni renkontiĝos...“

Tiu ĉi kongreso estis antaŭlasta, okazinta antaŭ la Dua Mondmilito. Tiu fakto elokvente parolas pri la aktiveco de la tiamaj e-istoj el Pleven. En ilia agado havis sian lokon ankaŭ Cvetan Spasov. En decembro 1940, kiam oni celebris la aŭtoron de la Internacia Lingvo — d-ro L. L. Zamenhof, li deklamis propran versaĵon, titolitan „Esperanto“.

Ce la funebra procesio de Dončo Atanasov, komunisto kaj esperantisto, kliun falĉis la ftizo, Cvetan Spasov per kortuŝaj vortoj adiaŭis sian karan amikon kaj kamaradon. Ce la tombo de la mortinto li recitis frangmen-

E-istoj en la parko „Skobelev“ en Pleven. Inter ili Cvetan Spasov (meze, kaŭranta) kaj Ljuben Cvetanov — sekretario de la DK de RMS, poste politika komisaro de XI partizana zono.

*RMS — Laboris'a Junulara Unuiĝo (junkomunista)



Canko MURGIN

Gazeto „La Mondlingvisto“

Post multaj preparlaboroj, en la komenco de oktobro 1889 la unua bulgara e-isto Miloslav St. Bogdanov (1868—1914) sukcesis fondi la unuan E-organizaĵon en Bulgario sub la nomo Esperantista Klubo de Sofio, kiu ludis ankaŭ la rolon de centra klubo (de provizora landa organizaĵo) kaj varbadis membrojn tra la tuta lando. En la fino de 1889 j. la klubo jam havis 112 membrojn. El ili tamen la plimulto restis simpatiantoj, kaj nur 25 ellernis E-on.

Por starigi regulan kontakton inter la e-istoj en Bulgario Miloslav Bogdanov entreprenis eldoni gazeton „La Mondlingvisto“, kiun li mem redaktis. Tiu gazeto havas la honoron esti la unua landa presorgano kaj la dua E-gazeto en la mondo (post la Nurnberga „La Esperantisto“ — internacia organo de la E-movado). En 1908 Georgo Davidov el u. Saratov, Rusio, intense serĉis jarkolekton de „La Mondlingvisto“ por sia biblioteko. Panajot Hitrov, konata bulgara e-isto, atestas en siaj rememoroj (1939), ke li vizitis la domon de Davidov kaj havis la plezuron vidi kaj foliumi la kalendarojn de „La Mondlingvisto“. En sia libro „Analiza historio de E-movado“ (1931) la sovetia esperantologo Ernesto Drezen citas tekston el „La Mondlingvisto“. Laŭ atesto de malnovaj bulgaraj e-istoj gazeton „La Mondlingvisto“ posedis la Nacia Biblioteko „Kiril kaj Metodi“ en Sofio, sed nun ne plu. Supozeble ĝi estis inter la libroj kaj gazetoj neniigitaj de la aviadilaj bombadoj kontraŭ Sofio dum la Dua Mondmilito. Tute certe posedis tiun gazeton P. Tarnov — la plej fama bibliografo de E-gazetaro en la mondo, kiu postlasis informojn pri la formato kaj paĝonombro de ĉiu kalendaro de „La Mondlingvisto“.

D-ro Joh. Dietterle, eldonante en 1928 la libron „Originala verkaro de L.L. Zamenhof“, insiste petis la bulgarajn e-istojn traserĉi la arkivojn, sed vane. En Bulgario neniu private posedis la gazeton. Preskaŭ 35 jarojn poste mi priskribis detale la enhavon de la tuta jarkolekto de „La Mondlingvisto“ (vd. „Historio de la bulgara E-movado“, kalendaro 1, 1964, Finnlando). Kiamaniere mi sukcesis restaŭri la enhavon de tiu gazeto, mi detale klarigas en speciale por tiu celo verkita artikolo, kiu aperis en gazeto „Paco“ (n-ro 3, 1979, Sofio).

Kiel sciante, de „La Mondlingvisto“ aperis nur tri numeroj en po mil ekzempleroj. La unua kaj la dua numeroj aperis preskaŭ sinsekve en decembro 1889. La tria numero — en januaro aŭ februaro 1890.

La unua n-ro havas 54, la dua — 10 kaj la tria — 32 paĝojn sub la devizo: „Progresado estas vivo, la stagnado — morto“.

ton el eseo de Atanasov, aperinta en la tagjurnalo „Zarja“. Per sia funebra parolado Spasov esprimis sian ide-politikan kredon.

Kiam dum la somero de 1942 jaro la milittribunalo en Pleven juĝis min, en la proceso staris ankaŭ la nomo de Cvetan Spasov — sekretario de la Distrikta Komitato de RMS. Li kaŝis sin de la polico. En la akuza akto inter la dudeko da nomoj de soldatoj figuris ankaŭ la nomo de kudristo kaj esperantisto el vilaĝo Stolât (distrikto de Gabrovo) Miĉo

Rolon de fruntartikolo en la unua numero ludas la „Malkovra (malfermita — C. M.) letero“ de M. Bogdanov. Ĝi estas presita paralele en bulgara lingvo kaj E-o. En tiu artikolo Bogdanov skribas: „Mi sentas la devon antaŭ ĉio danki la legantan publikon por la viva konsento, kiun ĝi montris kaj montras de tago al tago kaj de horo al horo por mia afero. La multaj promesoj, kiujn mi ricevis, kiel ankaŭ la leteroj kun kuragigoj aŭ konsiloj — ĉio tio ĉi montras al mi, ke mia profunda kredo je l'homaro min ne trompis.“

Sur paĝoj 4 ĝis 30 estas presita bulgarlingva artikolo de M. Bogdanov, kies unua parto estas verva muldado de tekstoj el la „Dua libro“ kaj el la „Aldono al la Dua Libro“ de d-ro Zamenhof. La dua parto de la sama artikolo estas plejparte traduko el la „Antaŭparolo“ de la „Unua Libro“ (ruslingve eldonita en julio 1887), precipe el tiu loko, kie d-ro Zamenhof klarigas la principojn de la E-gramatiko. Sur paĝoj 30—39 estas presitaj modelaj tekstoj en E-o: tri prozaj (Patro nia, el la Biblio, Letero, kvin versaj (originalaj — „Mia penso“ kaj „Ho, mia kor“; tradukitaj — „En sonĝo“ kaj „Al brusto al mia“ de Hajne, „Kanto de studentoj“ de Hemza) kaj dekunu proverboj sub titolo „Popoldiroj“.

Sur la ceteraj paĝoj (40—54) ĝis la fino de la unua numero estas donitaj instrukcioj pri plenigo de „Promeso“ por fariĝi senkondiĉa subtenanto de E-o kaj de formularo de peto por fariĝi membro de la „Esperantista Klubo“ en Sofio kaj informoj pri la aperintaj presantaj artikoloj en la bulgara gazetaro. Granda parto de la lasta (54a) paĝo estas okupita de grava rimarko, kiu jetas faskon da lumo al la politika evoluo de Bogdanov. Komence li estis monarkisto, sed poste fariĝis aktiva respublikano, membro de la Radikala Partio.

Kelkaj tagoj post la unua numero de „La Mondlingvisto“ aperis la dua n-ro. Ĝi estas maldika, 10-paĝa kalendaro, kiu enhavas nur tri materialojn: ĉefartikolo, la „Plena Gramatiko de la Lingvo Internacia“ kaj danko.

La ĉefartikolo denove estas verkita en formo de letero al la legantoj kaj presita en paralelaj tekstoj — Esperanta kaj bulgarlingva. Ĝi okupas du paĝojn (55 kaj 56) kaj tekstas jene:

Sofio, la 11/23. Decembro 1889
Karaj amikoj!

En mia batalo por nia sankta afero mi turnas min kun peto al ĉiuj veraj amikoj de nia lingvo Esperanto kaj mi esperas, ke Vi ne rigardos sen partopreno mian malfacilan laboron ka-

Kandev, mia samrolano de IVa infanteria regimento.

En tiuj dangleprolenaj tempoj la milittribunalo konfirmis du mortverdiktojn por la... esperantistoj Cvetan kaj Miĉo.

En februara frumateno de 1944 j., en domo apud la nunkonstruita panoramo „La epopeo de Plevna“, proksime al sia gepatra hejmo, en batalo kontraŭ la malamiko estingigis la koro de Cvetan Spasov en la nomo de la sanktaj idealoj de paco kaj socialismo.

Nano KJUČUKOV

ne lasos min fali, sed oferos ame al mi manon de helpo.

Amikoj! En Viaj manoj sin trovas nun la sorto de afero de grandega graveco! Se Vi donos al mi Vian helpon, ... tiam nia afero estos gajnita kaj la homoj eterne benados la finon de la XIIa centjaro.

En la nomo de la bono de l'homaro, kiu estas gale kara por mi kaj por Vi, mi esperas Vian helpon. ... se ĉiu amiko de nia afero gajnos nur ok abonantojn (112 aligitoj al E-klubo en Sofio $\times 8$ varbotaj = 896 abonantoj — kompletigo C. M.) por mia gazeto „La Mondlingvisto“ kaj „Plena Lernolibro por la mondlingvo de d-ro Esperanto“.

Kun kora saluto mi restas Via plej humila

M. S. BOGDANOV

repakto de „La Mondlingvisto“ kaj prezidanto de la „Klubo Esperantista“.

La dua presita materialo okupas sep paĝojn kaj prezentas la gramatikon de E-o el la Unua Libro (de julio 1887) tradukitan en bulgaran lingvon. En la lasta paĝo de la dua numero de „Mondlingvisto“ Bogdanov dankas pro la al li senditaj abonkitoj, klarigas, ke la reklamitaj presaj (gazeto kaj lernolibro de E-o por bulgaroj) malfruis pro la prokrastita livero de la speciale menditaj Esperantaj (kun supersignoj) kaj bulgaraj (por fonetika skribado) literoj. Promesante esti en la estonteco pli akurata, li esprimas esperon, ke la bulgara publiko helpas al li morale kaj finance.

La tria numero de „La Mondlingvisto“ enhavas E-bulgaran vortareton. En la unua (65a) paĝo staras volblinie presita titolo „Internacia-Bulgara Vortaro (en bulgara lingvo) kaj sub ĝi, horizontale, en E-o — „Vortaro por Bulgaroj“. Sur la dua duono de la sama paĝo estas presita en bulgara lingvo instrukcio, kiel uzi la vortaron. La sekvaĵ (66—67) paĝoj estas dediĉitaj al la „Antaŭparolo al la vortaro de la lingvo E-o“, presita nur en E-o. Kompare kun la originalo, en la presita teksto estas faritaj du negravaj ŝanĝoj kaj du nekrepligaj mallongigoj. Poste sekvas la vortprovizo de la vortaro mem. Laŭ Esperantaj radikvortoj ĝi estas identa al la Unua Libro. Estas ellasita nur unu radiko. Sur la lasta (96a) paĝo Bogdanov invitas la membrojn de la E-klubo abonon kaj abonigi gazeton „Mondlingvisto“, avertante, ke se oni ne



Miloslav Bogdanov

sukcesos varbi almenaŭ 1000 abonantojn, ĝi ne plu aperos; tiukaze la antaŭpagintoj anstataŭe ricevados la gazeton „Esperantisto“, aperantan en Nurnbergo.

La necesajn mil abonantojn oni ne varbis. Tio estis tasko nereala, ĉar tiutempe eĉ „La Esperantisto“ — la internacia organo de la E-movado, dum sia unua jarkolekto (1889—1890) havis nur 113 abonantojn el la tuta mondo (tri el ili estis bulgaroj: M. Bogdanov, Aristot Popov, Georgi Oreškov).

Post sia tria numero „La Mondlingvisto“ ĉesis aperi. Sed ĝi plenumis pozitivan rolon en Bulgario kaj parte en eksterlando, precipe en Rusio, instigante al lernado de E-o kaj plifortigante la ligojn inter la bulgara kaj eksterlanda E-movadoj.

GERMANAJ KONTRAŬFAŝISTOJ PRI GEORGI DIMITROV

Dum la jaro 1933 mi estis ankoraŭ ĉeĥoslovaka civitano germandevena. Tiam, junaj socialistoj, ni simpatiis al la komunista junularo kaj plenzorge observis la socian evoluon en Germanio. Tie multaj funkcioj de la komunista kaj socialista partioj elmigris pro persekutado fare de la hitleranoj, post kiam tiuj prenis la ŝtatan potencon. La antifaŝistoj elmigris al Francio, Aŭstrio, Anglio, Svislando kaj ankaŭ al Ĉeĥoslovakio. Multaj tamen ne havis eblecon elmigri kaj restis en Germanio, kie ili kaŝe batalis kontraŭ la faŝismo. Tiutempe en Germanio estis ankaŭ k-do Georgi Dimitrov. Li instigis la klaskonsciajn laborulojn kaj estis bonega modelo, kiamaniere oni devas kontraŭstari la reakciajn fortojn.

Tiam, 22-jara, ankaŭ mi estis preta helpi la batalon. Kaŝe trapasante la landlimon tra la arbaroj kaj montoj de Saksonio 2—3-foje dum semajno, mi portis en la dorsosako kontraŭfaŝismajn gazetojn kaj flugfoliojn al urbo Dresden. Tie kun ĉeĥoslovaka pasporto mi kontaktigis kun la germanaj kamaradoj kaj transdonis al ili la materialojn.

La 4an de novembro 1933 mi atingis Dresden per la vagonaro, kunportante en la dorsosako 50 000 malgrandajn foliojn. La teksto proksimume estis jena: „Germana popolo, la registaro mensogas la germanan laborklason. La brunaj fiĥomoj grasigas sin per altaj

salajroj. Ili preparas militon. Voĉdonu la 12an de novembro 1933 per NEI! Kun tiuj flugfolioj la saman tagon la sekreta politika polico Gestapo min arestis ĉe la stacidomo. Inter la kontraŭfaŝismaj batalantoj estis spionoj kaj pagitaj provokistoj. Kiam mi eniris Gestapon, tie jam estis arestitaj 23 gekamaradoj. Gestapo nin torturis. Estis arestitaj ankoraŭ 300 aliaj kamaradoj.

La 13—14an de marto 1934 la faŝista tribunalo kondamnis min je 4jara mallibereco. La juĝprocezon partoprenis 41 akuzitoj, alian proceson — 26 akuzitoj kaj proksime 300 apudakuzitoj. Ĉiuj estis kondamnitaj je diversa tempo de mallibereco.

En la gazetaro, kiun mi alportadis 2—3-foje semajne dum la aŭtuno de 1933 j., oni povis legi ankaŭ pri la lajpega tribunalo, kie la 23an de septembro 1933 ekparolis k-do Georgi Dimitrov. Mi scias, ke ĉeestis 82 korespondantoj de eksterlandaj gazetoj kaj 42 korespondantoj de germana gazetaro. Kompreneble, malpermesita estis la ĉeesto de korespondantoj de socialista, komunista kaj alia progresema gazetaro. Post la unua parolado de Dimitrov, okazinta la 23an de septembro, la disaŭdigo de la tribunalaĵaj kunsidoj estis ĉesigita kaj malpermesita. Estis klare, ke la hitleranoj ektimis la bravan bulgaran komuniston.

La tuta mondo tamen kun intereso kaj atentemo sekvis la rezultojn de la juĝprocezo. La nomo de Di-

punkto“.

Ĉiuj ili partoprenis aktive en la diskutoj kaj en la konkludaj paroladoj.

La nivelo de la seminario estis akademia, tamen ne en senco, ke laŭ formo kaj enhavo ĝi estis absolute teoria, nekomprenebla por nescienca laboranto, sed en senco, ke la scienca nivelo estis treege alta kaj la problemoj profunde analizataj.

En sia plimulto la partoprenantoj staris sur alta teoria nivelo. Ili havis profundan erudicion en la fako, en kiu ili laboras, kaj en la sociopolitikaj aspektoj de la E-movado, malgraŭ ke granda parto de ili ne estis sciencistoj. Ilia aĝo grandparte ne estis tre alta, kio signifas, ke relative junaj homoj aperas en niaj scienc-politikaj vicoj.

La disputoj estis vere intensaj, seriozaj, sub la signo de profundaj analizoj, kun pasia defendo de la propraj konceptoj kaj pozicioj. Sed malgraŭ la arda kaj intensa diskutado, ĉe ĉiu regis vera toleremo al la konceptoj kaj opinioj de la ceteraj partoprenantoj sur la fono de kamaradeco kaj bonvolemo. Tio estas tre grava, aparte inter e-istoj.

Dum kelkaj tagoj, kune travivitaj, kreigis vera amikeco inter la partoprenantoj. Ĝi kreskis ne nur dum la laborkunsidoj, sed ankaŭ ĉe la kontaktoj kaj interparoloj ekster la seminario. Eĉ nur rigardante la liston de la faritaj prelegoj oni povas kompreni, ke ili estis tro multaj. Estonte oni povas malpliigi la nombron de la prelegoj, akcentante pli sur la kvaliton kaj ne sur la kvanton. Tiam oni havos eblecon turni pli grandan atenton al la teoria nivelo, kaj samtempe restos sufiĉa tempo por diskutado pri ĉiu problemoj.

Estus bone, se oni sukcesus aperigi libroforme la materialojn de tiu tre utila kaj aktuala seminario. Tiam ili servos bonege en nia E-laboro.

La organizado de la seminario estis vere je plej alta nivelo, senripoĉa. Al la organizantoj kaj aparte al k-do Detlev Blanke plej koran dankon.

prof. Vasil ĈOĈOV

La seminario okazis inter la 18—24 de novembro 1979 en Bad Saarow proksime al Berlino. Ĝin partoprenis delegitaroj el Bulgario, Ĉeĥoslovakio, GDR, Hungario, Japanio, Pollando, Rumanio, Sovetunio, Svedio. Krome dum unu aŭ du tagoj ĉeestis la kunsidojn kiel gastoj-neesperantistoj elstaraj sciencistoj el GDR — profesoroj kaj doktoroj — por konatigi kun la laboro de la seminario kaj havi personajn impresojn pri la taŭgeco de E-o kiel trafa ilo por diskutado de sociolingvistikaj problemoj.

Estis faritaj multege da raportoj: „Sociopolitikaj aspektoj de la E-movado“ (enkonduko en la seminaran kadran temon) de d-ro Detlev Blanke (GDR), „Politikaj aspektoj de la internacia lingvo“ de prof. d-ro Mahomet Isajev (USSR), „Pri la antikomunismo en la nuntempa E-movado“ — d-ro Jaromir Jermař (ĈSSR), „Lingva politiko en evolulandoj“ — d-ro Renato Korseti (Italio), „Sistemo de lingvouzo en la internaciaj rilatoj“ — d-ro A. Ratkai (Hungario), „Formigo de la internacia personeco“ — d-ro T. Tiblevski (Pollando), „Realismaj kaj progresemaj konceptoj en la E-movado de la nuntempo“ — I. Peteš (Hungario), „Sekteco en la E-movado“ — D. Blanke, „La loko de la E-movado en la organizita socialisma socio — politikaj kaj juraj aspektoj“ — Boleslav Stašćak (Pollando), „E-movado kaj ĝiaj rilatoj al la neesperantista socio“ — Tibor Vaško (Hungario), „Aspektoj de la Japana E-movado“ — d-ro J. Sato (Japanio), „Aspektoj de la sveda E-movado“ J. Skogeklint (Svedio) ka.

La membroj de la bulgara delegitaro faris la jenajn prelegojn:

Nikola Aleksiev: „Objektivaj premisoj por partopreno de la esperantistaro en la pacbatalo“;

prof. Vasil Ĉoĉov: „Esperanto kaj la kulturaj kaj etikaj valoroj“;

Canko Murgin: „Evoluo kaj aspektoj de la ideologio de Zamenhof el nuntempa vid-

mitrov farigis konata en la tuta mondo. Por ni mem, la arestitaj germanaj antifaŝistoj, k-do Dimitrov estis granda heroo. Lia sentima kaj saĝa apelo antaŭ la tribunalo, liaj batakonsekvencaj vortoj instigis ĉiujn, kiuj ĝemis sub la faŝista jugo.

La 9an de decembro 1937 la germanaj faŝistoj elpulis min reen al Ĉeĥoslovakio, jam 26-jaran viron, kie tuj mi aliĝis al la Ĉeĥoslovaka Komunista Partio. En oktobro 1938 la germanaj hitleranoj eniris Ĉeĥoslovakion. En la momento mi estis ĉeĥoslovaka soldato. Dum la okupacio mi estis denove persekutata kaj en 1942 oni sendis min al punbataliono 999. La 4an de majo 1943 mi estis jam militkaptito en urbo Bizerta, Tunizio (Nord-Afriko).

En novembro 1945 mia edzino elmigris al Bernburg,

Germanio. Post kvarjara militkaptiteco en 1947 mi estis liberigita kaj venis la saman urbon, kie ni loĝis 4 jarojn. Poste ni translokiĝis al Ercmontaro, kie mi laboris en uranminejo kiel ministo.

En Bulgario mi ĝis nun estis 3-foje. Kun granda estimo mi vizitis la maŭzoleon de Dimitrov. Mi bone scias, ke por la bulgara popolo k-do Dimitrov estas tio, kio estas Lenin por la sovetia popolo. Ni, la germanaj esperantistoj-komunistoj, kun profunda simpatio rigardas la grandajn ekonomiajn akiraĵojn de nova Bulgario kaj deziras plurajn sukcesojn al la libera bulgara popolo survoje al komunismo.

Rudolf Eichler
Schwarzenberg (GDR)

Por granda ekspozicio okaze de la glora 110a naskiĝtago de V. I. Lenin la Samarkanda E-klubo de Interpopola Amikeco petas ĉiujn samideanojn URĜE sendi ĈIULINGVAJN materialojn pri Lenin: verkojn de Lenin, fotojn de Lenin-monumentoj, de lokoj, kie li loĝis, de muzeoj, uzinoj, stratoj, lernejoj, institutoj kaj aliaj, portantaj lian nomon, librojn, afiŝojn, poŝtmarkojn k. s. pri li, nacilingvaj artikoloj de personoj, konintaj Lenin, ktp. Ĉiu sendaĵo rekompencota per belaj uzbekaj memoraĵoj.

Bonvolu sendi ĉion al la respondeculo: Anatolo Ionesov, SU-703 000 Samarkand, ul. Sovetskaja 53, Uzbekistano, Sovetunio.

PRIPACA E-EKSPOZICIO

En la aŭtuno de 1979 en la centra ekspozicia salono de la 2500-jara Samarkando (Uzbekistano) estis organizita granda pripaca ekspozicio, dediĉita al la Internacia Jaro de Infano. Organizanto — la Samarkanda E-klubo de Internacia Amikeco kunlabore kun la Uzbeka Amikeca Asocio.

Ce la inaŭguro salutparoladojn faris gvidaj kamaradoj el la Uzbeka Amikeca Asocio, Pacdefenda Komitato kaj estraro de la E-klubo. Ĉiuj subtekis la laŭdindan porpagan aktivadon de la samarkandaj e-istoj kaj la helpon de E-o por la organizado de ekspozicio — vere internacia, el materialoj ricevita el ĉ. 30 landoj. Pri la evento vaste informis la gazeto, specialaj afiŝoj kaj invitiĵoj.

La estraro de la E-klubo profunde dankas al ĉiuj, kiuj sendis materialojn, aparte al s-anoj Roland Schnell (FPG), Joe Gamble (Usono), Henri Masson (Francio), Lenke Dombóvári, Zoltan kaj Eva Val (Hungario), Petro Poliščuk (USSR). La ekspozicio funkciis tre sukcese dum du semajnoj. Oni decidis, ke en Samarkando ĝi fariĝu tradicia, ĉiujara. Tial la supra alvoko pri kontribuo restas ĉiam valida!

Ekde septembro 1979 en la plej granda mezlernejo en Samarkando ekfunkciis fakultativa instruado de E-o. La Internacian Lingvon eklernis 35 gelnantoj sub la gvido de instruistino G. I. Sarjukova. Kuragigaj salutleteroj estas atendataj el la tuta mondo. Krome la lernantoj volonte starigus amikajn ligojn kun ĉiuj similaj E-kolektivoj. Bonvolu amase skribi al adreso: Galina Ismailovna Sarjukova (porta Esperanto-kurso), SU-703 048 SAMARKANDO, ul. A. Ikramova 44, Srednjaja ŝkola n-ro 29, Uzbekistano, USSR.

Parolas k-do A. Ionesov



VESELIN DAMJANOV EN ITALIO

En novembro 1979 la artisto el la Stata Muzikteatro „Stefan Makedonski“ en Sofio Veselin Damjanov gastrolis en Italio laŭ invito de la E-organizaĵo en u. Trieste kaj la Instituto pri Muziko „Vivaldi“. Damjanov havis koncertojn en Trieste kaj Monfalcone ĉiam kun granda sukceso. Liaj recitaĵoj estis disaŭditaj de la itala kaj slovena radiostacioj, kiuj intervjuis la kantiston. La gazetaro vaste reĉis al la gastrolado de Damjanov, kiu kantis en bulgara, rusa, franca, itala kaj Esperanto. Interalie ĵurnalo „Il pikolo“ skribis:

„La multnombra publiko en la Halo de Arto kaj Kulturo aŭskultis la bulgaran baritonon Veselin Damjanov kaj esprimis ŝtormo sian admiron pro liaj emociaj plenumoj... V. Damjanov havas freŝan voĉon... Lia voĉo estas forte esprimiva, kun admirinda drama reliefo.“

*

Nia kara E-kantisto Veselin Damjanov koncertis ankaŭ en Vinkovci (Jugoslavio, 35000 loĝantoj) revenante el Trieste, kie li havis tri koncertojn.

Por la e-istoj de Vinkovci kaj de la najbara pli granda urbo Orjele Damjanov kantis esperantlingve bulgarajn, rusajn, francajn kaj slavajn kanzonojn — sukcese bele kaj emocie kiel ĉiam (jam bone konate tra la E-mondo).

Amike

N. Med, deligito de UEA

ESPERANTO-INSTRUADO EN SOVETIO

La fondo de Asocio de Sovetaj Esperantistoj (ASE) tuj plialtigis la intereson al la Internacia Lingvo en nia lando. Oni organizis multajn E-kursojn en diversaj lokoj.

En Tallin funkcias 3 kursoj ĉe E-klubo kaj ĵus ekfunkciis E-kurso por ruslingvanoj, unua tia en Estonio. Oni lernas ĉe kulturdomoj, ĉe uzinoj, en lernejoj, sed estas sentata granda manko de instruistoj. La manko de lernolibroj estas alia grava obstaklo de la lernado, mankas ankaŭ vortaroj... Por legomaterialo oni uzas E-tradukojn el estona literaturo kaj diversajn lernolibrojn, havante nur unu ekzempleron... por la instruisto. La lingva nivelo ĉe tia lernado ja ne povas esti alta. Por plibonigi la situacion oni sendis en 1979 du sovetajn e-istojn al Bulgario, kie ili partoprenis la kursojn por pedagogoj en Burgas. En Estonio estos en julio 1980 oficiala seminario por E-instruistoj el Tallin.

La estro de la instrufako ĉe ASE, k-do Boris Kolker, preparas rimedojn por plibonigo de la instrukvalito. Lin helpas samcele la soveta sekcio de ILEI J. Palu, hiu jam prezentis al la ministerio manuskripton de lernolibro por la estonaj lernejoj. Same en Estonio estos aranĝita koresponda E-kurso. En Latvio funkcias E-rondoj ĉe pionirdomoj (instruas s-ano T. Bercis), similaj laboras en Ternopol (s-anoj Bejbur V. A. kaj Galajčuk J. I.), en Petropavlovsk en Kamchatko (A. Natinj) ktp.

La tutsoveta lernoprogramo por lernejoj oni prezentos baldaŭ al la koncernaj institucioj, do ni havos konstante kreskantan lernantaron de la lingvo de l' amikeco.

Johannes Palu



SINCERA KONTAKTO KUN LA PUBLIKO

Gastado de la infana teatra trupo en Sofio

La infana esperantista teatra trupo en urbo Burgas estas ĝojiga evento. Fakte tio estas la pionira dramrondo, kiu post certa ekzistado fariĝis studtrupo de la ŝtata teatro en la urbo. Tiu fariĝo estas tute merita, ĉar siajn spektaklojn la 20 infanoj ludas ĉiam en plenplenaj salonoj. La malgrandaj aktoroj (8-16-jaraj) efektive mirindan, senperan, sinceran kontakton kun la publiko. Ili kaj ilia gvidanto jam konkeris 8 orajn kaj 13 argentajn medalojn. Malantaŭ ili jam estas 30 spektakloj.

Fakte ili kunigis stile en unu fabelon kelkajn fabelojn de la granda verkisto Andersen, kiuj konvinkas prezentas antaŭ la spektantoj la batalon inter la bonaj kaj malbonaj fortoj. La kavaliro „Aŭdu mian violonon“ (la nomo de la ĉefa heroo) per la ludo de sia violono transformas en bonajn ĉiun malbonajn, igas la homojn pensi pri siaj pekoj, igas ilin ĉirkaŭbrakumi unu la alian. Per sia nobla ago li malhelpas al la sorĉistino Avino Jaga, kaj ŝi forŝtelas lian violonon, disigas diversflanken la violonujon, la arĉon kaj la violonon mem: la unua estas alproprigita de iu veturanta trupo, la arĉo atingis bandon de rabistoj, la violonon profitis ciganino, ludiganta urson. Kompreneble, sen sia violono la kavaliro ne povas efektive vivi en la socio sian noblan agon.

Estas ĝoje rigardi kiel libere, flue, majstre la junaj aktoroj plenumas siajn rolojn. La paŝtistino, la kamienpurigisto kaj aliaj reprezentantoj de la bonintencaj fortoj de la vivo faras ĉion eblan por trovi la violonon de la kavaliro, trapasas diversajn dange-rojn, por ke „Aŭdu mian violonon“ povu plenumi sian noblan agon. Kaj finfine ili venkas. Do, la bono en la vivo venkas! Ĉiuj infanetoj ludas kiel spertaj aktoroj kaj faras la spektaklon interesa ankaŭ por plenkreskuloj. La infanoj deklaras, ke en Esperanto la teatraĵo estas al ili pli intesa, kiel nova.

Jen kelkaj iliaj eldiroj:



Rosica Slavova (10-jara): „En mia laboro en la esperanta teatro mi elkreskis kaj eksciis multon. Sajnas al mi, ke nia teatraĵo sonas pli bone en Esperanto. Mi estas feliĉa, ke mi partoprenas en tia teatro, ĉar la homoj, kiuj povas ĝoji pri tio, estas malmultaj.“

Zlatko Gulekov (lernanto en angla gimnazio): „Per Esperanto la bildoj de nia teatraĵo riĉiĝis.“

Nikolaj Atanasov: „Esperanto helpis fari nian teatraĵon pli belsona. Mia heroo fariĝis pli komprenebla!“

Deljana Haĝijankova: „La Esperanto-teatro estas nova voĉo pri la beleco.“

Radostina Vrangova: „La partopreno en esperanta teatro interesigis min pri novaj aferoj, ĝi helpis al mi eniri en belan mondon. Mi konvinkigis pri la belsoneco de la lingvo.“

Svetlana Janĉeva: „Esperanto riĉigis min spirite. Estas belege havi eblon kontakti kun homoj el tuta mondo.“

La spektaklo de la infana Esperanto-teatro, kiun ni rigardis en Sofio je la 10a de decembro 1979, ankoraŭfoje montras la senliman uzokapablecon de Esperanto.

La perfekta ludo, la perfekta prononco de la junaj e-istoj montras, ke tia esperantaĵo devas esti plej vaste profitata en la vivo de la esperantistaro ne nur en Bulgario, sed ankaŭ mondscale. Kompreneble, la gvidanto de la trupo Dimitro Elenov — aktoro de la ŝtata dramteatro en Burgas — kaj ĉiuj entuziasmaj infanoj-aktoroj (tre inteligentaj kaj laborkapablaj — kelkaj scias fremdajn lingvojn) plue perfektigas la spektaklon, kaj ĝi povos kontentigi plej postuleman publikon.

Tia mirinda evento devas kreski kaj flori per la zorgoj de nia E-movado.

Dimitro Denĉev

deziras respondi

Bulgario

Elena Ivanova Stojkova — k.s. „Slavejkov“, blok 22, vĥod 7, et. II, p. k. 19, 8000 Burgas (32-jara, infaninstruistino, gvidantino de E-kursoj — kun ĉi pri ĉi).

iRumen Popov — BG-5058, selo Hotnica, Velikotŝarnovsko (38-jara fraŭlo, elektroteknikisto, prefere kun 30-45-jaraj medicinistoj el ĉi).

Ivan Todorov Kolev — kv. Družba, str. Ulanbator 20, Sofio (jov. turismo).

Ekaterina Vasileva Joyĉeva — str. D-r Nikola Kovaĉev 3, 4000 Plovdiv (20-jara

fraŭlino, flegistino — muziko, sporto medicina literaturo).

Ilian Boev — str. Slivnica 1, Pleven (20-jara fraŭlo, kun ĉi).

7 junaj liceaj geinstruistoj — tutmonde. Komuna adreso: SPU „9 de septembro“ (Pedagogia Esperanto-grupo), 5180 Polski Trâmbeŝ.

Goran Dimitrov — 5540 selo Stojanovo, Loveŝko (38-jara).

Danail Vâlkov — str. Gavril Genov 11, 5500 Loveĉ (23-jara fraŭlo — pri ĉi kaj speciale pri diapositivaj).

Rumjana Ganĉeva — 5662 selo Beli Osâm, Loveŝko (28-jara fraŭlino, instruistino).

Radinka Marinova — str. Ĥristo Botev 46/B, Loveĉ 3 (30-jara instruistino).

Geknaboj 11-14-jaraj — tutmonde. Skribu al ĉi instruisto: Petko Ganĉev Pavlov — 4348 selo Kliment, Plovdivsko (por Fotoklubo „Esperanto“).

Toth Robert — Magyarorszag, Szekesfeherwar, Pinter Karoly 26 1/1 (lernanto).
Gajdos Pal — Hajdusamson, Szabadsag ter 5, H-4251 (27-jara, instruisto de literaturo — pri vojaĝoj, ikono-pentrao ka.).
Lukaas Andras — Budapest, Budafoki ut 81.8. H-1117 (kun geofizikistoj tutmonde).
Andrea Kovacs — H-1131 Budapest, Mosoly 21. F. sz. 4 (lernantino — kun gelnantoj).

Sovetunio

Membroj de Klubo de Internacia Amikeco ĉe la universitato en u. Gorkij — tutmonde. Adreso de ilia gvidanto: V. P. Beškarev, 603137 Gorkij, prosp. Gagarina 222, kv. 85. Skribu al junaj e-istoj pere de ilia kursgvidanto: A. Mikk, str. Kauge 30—35, 202 900 Viljandi.

20 novaj e-istoj — tutmonde. Komuna adreso: Muzeo, KID, „Esperanto“, ul. Galila 13, Tjumenskaja obl., 626 440 USSR. Novaj e-istoj diversaj, multaj el ili 17-jaraj gelnantoj — tutmonde. Skribu al ilia kursgvidantino: Kriger Tatjana — glavpoĉtam, do vstrebovanja, Jalta, Krimo, SU-334200.

E-istoj diversaj — tutmonde. Komuna adreso: Esperanto-klubo, abonkesto 8, Ivanovo — centro.

Kursgvidanto serĉas korespondantojn por si (23-jara studento de radiotekniko — pri ĉi kun ĉi) kaj por siaj kursanoj. Skribu al: Barzdunov Vjaĉeslav Mihajloviĉ — ul. Nemiroviĉa-Danĉenko 14, kv. 49, 630079 Novosibirsk — 79.

2 fratinoj-gemelinaj, 20-jaraj fraŭlinoj, studentinoj — tutmonde pri muziko, turismo, ingro, bk, pm k. a.). Skribu al: USSR, Kartvelio 383 521, u. Gori, Dzevara, Golbordi Tamara (aŭ Golbordi Tina).

Serhij Klimenko — Ogorodnaja str. 24, 480090 Alma-Ata (27-jara instruisto de rusa lingvo — tutmonde pri lingvoj, artoj k. a.).

Siberiaj studentoj de farmacio kaj medicino — tutmonde pri fakaj kaj modernaj problemoj. Skribu al ilia gvidanto: A. Gonĉarov, p. k. 11, Barnaul — 99, 656 099 USSR. Respondo certa.

13—14-jaraj gelnantoj — tutmonde. Skribu al ilia gvidanto: K. Lukoŝevičius, Utenos raj., 234900 Saldutiškis, Esperanto-rondeto.

Esperanto-rondeto, ŝkola 728, Moskva, Ĉertanovo (kun bulgaraj gelnantoj el la 7a klaso).

20 junaj geesperantistoj (16—19-jaraj) — tutmonde. Komuna adreso: Esperanto-kursoj, T. Lukoŝevičius, Hidromelioracia teknikumo, Panevezys, Litovio, USSR.

Gulidov Anatolij Nikolajevič, USSR-634050 Tomsk-50, glavpoĉtam, do vstrebovanja (20-jara, studento).

Infanoj 10—15-jaraj, membroj de Esperanto-klubo kaj ilia gvidantino — tutmonde. Adreso: USSR, Latvio — 229161, Limbazu raj., Pociems, 8-gad, ŝkola, Vija Granta (39-jara — bk pri floroj kaj vidaĵoj).

Nadeŝda Egorova — Poleŝoj proezd 9—11, Ivanovo — 9, 153 009 (21-jara studentino pri biologio).

Kosta Vira — Krasnoarmejskaja 148, 295560 Korolevo (16-jara).

Erikas E. Laikonas, Kaunas — C. post-restante, Litovio (29-jara speleologo — en E-to, angla, litova, rusa — turismo, kavernoj, montoj).

Folomodova Tatjana — str. Kirova 15, Rostovskaja obl., Jukovo — 3, 346340 (16-jara — pri ĉi, interŝanĝo bk).

En j. „Iskra“, u. Kazanlak (29. IV. 1979): informo de ing. Svoboda Damjanova pri la solenaj omago al 75-jariĝo de la Loka E-societo „Roza Valo“ kaj ĝia distingo per la ŝtata ordeno „Kiril kaj Metodi“ I grado. Pri la samo informas per korespondadoj ankaŭ Georgi Nastev en j. „Septemvri“ — Stara Zagora (12. VIII).

En la sama ĵurnalo (VII): informo de K. Cindin pri gastado de eksterlandaj e-istoj en Kazanlak.

En j. „Impuls“, organo de Ministerio de Informado (3. VII.): artikolo „Ligo inter bulgaraj kaj rusaj e-istoj en la komenco de la XXa jarcento“ de Petro Hlebarov.

En la sama ĵurnalo (24. VII): artikolo „Esperanto — vivanta lingvo“ de Draguŝko Petrov.

En la sama ĵurnalo: informo pri la fakkunsido de IPTEA dum la 64a UK de E-o en Lucerno.

En j. „Rodopski Ustrem“, u. Smoljan (10. VII): informo de Marija Diĉeva pri sukcesa e-ista pedagogia konferenco en la ejo de Internacia E-Kurso en Pisanica.

En j. „Dupniŝka Komuna“, u. Stanke Dimitrov (21. VII): artikolo „Lingvo de amikeco kaj interkompreniĝo“ de Stoil Kolarov, prezidanto de la loka E-societo „Marek“.

En j. „Evrejski Vesti“, Sofio (23. VII): rememoroj de Stela kaj Mojs Benvenisti pri Emil Sekerĝijski, heroo-esperantisto, pereinta en la antifaŝista batalo.

En j. „Ĉepinec“, u. Velingrad (27. VII): rememoroj de Manol Colev pri la unuaj paŝoj de E-o en Velingrad.

En j. „Veĉerni Novini“, Sofio, (29. VII): informo de Lasto Nikov pri baldaŭ komenciĝantaj Internaciaj Kursoj por E-Instruistoj en Burgas, kv. Meden Rudnik. La sama aŭtoro aperigis korespondadojn pri la bonaj rezultoj de tiuj kursoj en j. „Ĉernomorski Front“, u. Burgas (4. IX) kaj en j. „Oteĉestven Front“, Sofio (21. VIII).

En j. „Oteĉestven Front“, Sofio (30. VII): artikolo de Nano Kjuĉukov sub titolo „Riĉanima, multifaceta persono“ — pri Nikola Aleksiev lige kun lia 70-jariĝo kaj distingo per la alta honora titolo „Heroo de la Socialisma Laboro“. Detale pri lia E-agado.

Al Nikola Aleksiev dediĉis artikolon sub la titolo „Fidela filo de la partio kaj la klaso“ ankaŭ j. „Kom“, u. Berkovica (15. VIII).

En la semajna ĵurnalo „Literaturen Front“, organo de la Asocio de Bulgaraj Verkistoj (9. VIII): rememoroj de Boris Vapcarov pri lia frato — la granda bulgara poeto-heroo Nikola Vapcarov. La aŭtoro mencias, ke N. Vapcarov havis bonajn rilatojn kun e-istoj en u. Varno.

En j. „Naroden Drugar“, u. Jambol (9. VIII): informo de Dimo Trudoljubov pri mezlerneja E-laborbrigado.

En la sama ĵurnalo (16. VIII): informo pri renkontiĝo de la brigadanoj el la sama brigado kun e-istoj veteranoj el u. Jambol.

En la sama ĵurnalo (25. IX): artikolo „Esperanto — lingvo kaj movado“ de Dimo Trudoljubov, prezidanto de la Distrikta Estraro de BEA.

En la sama ĵurnalo (13. X): informo de Mihail Jordanov pri la komenciĝo de la E-lernojaro per tri kursoj en la urbo.

En la monata gazeto „Zaŝtita na Mira“, eldono de la Komitato de Paco, n-ro 7—8: artikolo sub titolo „Rigardo al la vasta mondo“ de Hr. Manolov, prezidanto de E-societo „Progreso“ en u. Polŝi Trâmbeŝ. Li rakontas detale pri la kunlaboro kun la neesperantistaj organizaĵoj kaj institucioj kaj precipe pri tri ekspozicioj el materialoj ricevita pere de E-o.

En j. „Podeni“, u. Polŝi Trâmbeŝ (3. IX): vojaĝimpresej sub titolo „Polŝi Trâmbeŝ — Abaliget“ de Maria Manolova.

En j. „Ŝumenska Zarja“, u. Ŝumen (13. IX): du materialoj — informo pri E-solenajo omago al la 35-jariĝo de la socialisma revolucio en Bulgario kaj skizo pri la e-isto ŝakisto d-ro L. Conov.

En j. „Rabotniĉesko Delo“ — organo de CK de BKP, Sofio (24. IX): sub titolo „Per la lingvo de la amikeco“ — detala korespondado de la propra korespondanto de la ĵurnalo en u. Pazarĝik Momĉil Ĝarev pri la diversflanka agado de la e-istoj en tiu urbo.

En la monata revuo „Yeni Hajat“ (en turka lingvo), Sofio, kajero 9: artikolo „Impresoj pri Islando“ de Mihail Sekerĝiev. Mencion pri la 62a UK de E-o en tiu lando.

En la kultura semajna gazeto „ABV“, Sofio (2. X): artikolo „La kantoj de Vapcarov tra la mondo“ de Veneta Petrova. Mencion, ke la unuaj fremdlingvaj tradukoj de versaĵoj de la poeto-heroo estas en E-o.

En j. „Drjanovska Iskra“, u. Drjanovo (3. X): artikolo „Esperanto — lingvo de paco kaj amikeco“ de Geno Manev.